

Esperanto aktuell 2012/3



Friede durch Esperanto

FRIED
Internationale Esperanto-Friedensbewegung

Eine Sprache als Friedens-Statement

Esperanto, die 1887 von dem polnischen Augenarzt Ludwig Zamenhof veröffentlichte Sprache, hatte bereits im 19. Jahrhundert zahlreiche Anhänger unter den Pazifisten. Neben Alfred Hermann Fried engagierten sich u.a. auch Heinrich Gustav Arnhold, Sándor Giesswein, Henri Marie La Fontaine, Gaston Moch, Felix Stone Moscheles, Edmond Privat und William Thomas Stead innerhalb der Esperantobewegung.



Fried sendet Esperanto
Am 6. Dezember 1901 schreibt Fried seinen ersten Brief in Esperanto an Gaston Moch.

Nach 15 Monaten nach dem Alfred Fried von seinem ersten Brief in Esperanto geschrieben hat, publiziert er sein Lehrbuch der internationalen Hilfssprache „Esperanto“.

Zahlreiche Personen lernen mit Hilfe des Lehrbuches von Alfred Fried Esperanto. Viele von ihnen korrespondieren auch mit Fried in Esperanto.



Die Monatszeitschrift *Esperanto* ist das Sprachorgan der Esperanto-Friedensgesellschaft, die Gaston Moch 1905 gründet und der auch Alfred Fried angehört.



Vor dem Ersten Weltkrieg sind zahlreiche pazifistische Bücher in Esperanto-Übersetzungen erschienen. Neben Frieds Artikeln auch Schriften von Andrew Carnegie, Johann von Büsch, Elie Ducommun, Henry Dunant und Bertha von Suttner.



Alfred Hermann Fried mit Teilnehmern des I. Esperanto-Kongresses 1905 in Badgastein auf dem Balkon des Chateau Zamenhof. Stehend v.l.n.r.: Gaston Moch, Oda Simon, Alfred H. Fried, 3 Herren aus Celan, Auguste Capé-Montreuil.

Anschaukarte von *Esperanto* mit dem Vizepräsidenten der Esperanto-Friedensgesellschaft und Generalsekretär der *Internacia Scienca Asocio Esperantista* - an Alfred Fried, 1903.



Anschaukarte von *Esperanto* mit dem Vizepräsidenten der Esperanto-Friedensgesellschaft und Generalsekretär der *Internacia Scienca Asocio Esperantista* - an Alfred Fried, 1903.



Alfred Fried ist das 58. Mitglied der Esperanto-Kolonie (Vater, 8. P., an 10. eines der ersten Mitglieder (Beitritt 14. Dezember 1906) der Wiener Esperanto-Gesellschaft.



Organisationskomitee des 4. Esperanto-Kongresses in Dresden 1909: Alfred Fried, Heinrich Gustav Arnhold, Marie Hankel, Eduard Mytil, Albert Schramm.



Postkarte von Marie Hankel an Alfred Fried, 9.12.1901.

In ihrem Schreiben gratuliert die Schriftstellerin Alfred Fried zur Verleihung des Nobelpreises und selbst u.a.: „Ihren verdanke ich das, Glück Esperantistin zu sein und durch Esperanto bin ich auch Pazifistin geworden.“

„Ich bin seit 12 Jahren der unerschütterlichen Überzeugung, dass durch die Esperantosprache das Problem der internationalen Hilfssprache vollständig gelöst ist. (...) Esperanto ist heute nicht nur die vernünftigste internationale Hilfssprache, sondern auch die verbreitetste.“

Zitat Alfred Frieds, *Festschrift* anlässlich des 8. Deutschen Esperanto-Kongresses, 1913.



Produkt zum 56. Esperanto-Weltkongress in London, 1971.



**Ekspozicia
tabulo pri Fried:
Efika kunlaboro
de AEF kaj GEA**

**Du novaj vizaĝoj
en la Berlina Oficejo**

**Herzberg enplektita
en multaj kulturaj
societoj**

**Unsere Bibliotheken
und Archive**

Deutscher Esperanto-Bund e.V. (D.E.B.)

Germana Esperanto-Asocio r.a. (GEA)

Amtsgericht Berlin VR 13651 B
www.esperanto.de/deb

Adreso kaj Oficejo / Anschrift und Geschäftsstelle

Henryk Wenzel, 030/692048-460, faks. -469,
Einbecker Straße 36, 10317 Berlin
infozentrum@esperanto.de

Ĝenerala sekretario / Generalsekretär

Martin Schäffer, deb@esperanto.de

Membropriorgado / Mitgliederbetreuung (KiDiS):

gea.ma@esperanto.de

Bankkonto (por membrokotizoj kaj donacoj) / **Bankverbindung** (für Mitgliedsbeiträge und Spenden): Sozialbank Mainz, BLZ 550 205 00, Konto 8603600. Spenden und Mitgliedsbeiträge für den D.E.B. sind steuerlich abzugsfähig.

Estraro / Vorstand

Netzpost an / retmesaĝo al
gea.fe@esperanto.de

Die einzelnen Netzpostadressen haben die Form Vorname.Name@esperanto.de, soweit nicht anders angegeben.

Prezidanto / Vorsitzender

D-ro / Dr. Rudolf Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, 48356 Nordwalde, tel. 02573/626

Vicprezidanto / Stellv. Vorsitzender

Andreas Emmerich, Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal, 06063/913714

Trezoristo / Finanzverwalter

Andreas Diemel, Bismarckstraße 168, 47057 Duisburg, gea.tr@esperanto.de, 0203/2964877, Büro: 0211/4566913, Mobil: 0175/2809371, Fax: 03212/2631982

Varbado / Infomaterial

Sebastian Kirf, Dodo-Wildvang-Str. 4, 26723 Emden, 07000/5473638, retposhto@kirf.de

Instruado / Lehrerarbeit

Christof Krick, Günninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, 02981/899557

Eksteraj rilatoj, gazetara parolisto / Außenbeziehungen, Pressesprecher

D-ro/Dr. Rainer Kurz, Plettenbergstr. 19, 70186 Stuttgart, 0163/3873785

Landaj ligoj / Landesverbände

Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, 53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler, 02641/4885

Europa laboro / Europaarbeit

Felix Zesch, Bornemannstr. 11, 13357 Berlin, tel. 0371/50349336

Jugendvertreter / GEJ-komisiito

Clemens Fries, Durl. Allee 57, 76131 Karlsruhe
Germana Esperanto-Junularo / Deutsche Esperanto-Jugend

Carl Bauer, Scheunenstraße 38, 17139 Malchin, Tel. 01724826569
farmingcarl@googlemail.com

Komisiitoj / Beauftragte

esperanto.de/deb/beauftragte.html

Gazetara laboro / Pressearbeit

Thomas Sandner, Georg-Boehringer-Weg 17, 73033 Göppingen, 07161/9869392, 0172/2658027, Thomas.Sandner@esperanto.de
Horst Vogt, Teurerweg 92, 74523 Schwäbisch Hall, horst.vogt@esperanto.de
Hermann Kroppenber, Broicher Str. 37, 51429 Bergisch Gladbach, medienecho@esperanto.de

Libroservo / Bücherdienst

D-ro / Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, (vespere/abends) 06136/46232, Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de, www.esperanto-buchversand.de

Printempa Semajno Internacia (PSI) /

Internationale Frühlingswoche

Wolfgang Bohr, (Adresse siehe unter / adreson vidu sub „Landaj Ligoj / Landesverbände“), psi@esperanto.de, www.esperanto.de/psi

Rondvojaĝoj / Rundreisen

Lars Sözüer, Realschulstr. 12, 47051 Duisburg, lars.duisburg@gmx.de

Kontaktadresoj / Kontaktadressen

Julia Noe, Handschuhsheimer Landstr. 91, 69121 Heidelberg, tel. 06221-3270724, Julia.Noel@esperanto.de

Pliaj adresoj / Weitere Adressen

Germana Esperanto-Junularo (GEJ) / Deutsche Esperanto-Jugend (DEJ)

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, bero@esperanto.de, www.esperanto.de/gej

Interkultura Centro Herzberg (ICH) / Bildungszentrum des D.E.B.

Komisiitoj/Beauftragte: Zsófia Kóródy (instruado), Peter Zilvar (klerigado kaj kulturo), Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, die Esperanto-Stadt, 05521/5983, Fax -/1363, esperanto-zentrum@web.de, http://esperanto-urbo.de

Germana Esperanto-Instituto /

Deutsches Esperanto-Institut

Prof. D-ro/Dr. Martin Haase, Lehrstuhl für Romanische Sprachwissenschaft, 96045 Bamberg, 0700/54648478, Martin.Haase@uni-bamberg.de, www.martinhaase.de

Germana Esperanto-Biblioteko /

Deutsche Esperanto-Bibliothek

p/a. Karl Heinz Schaeffer, Schulstr. 17, 73432 Aalen, kh.schaeffer@t-online.de

Fondaĵo FAME / FAME-Stiftung

Herbert Mayer, Postfach 308, 1015 Wien, herbert.mayer@onb.ac.at

Stiftung Mondo

Hauptstr. 42, 64753 Brombachtal, 030/692048-460, stiftungmondo@gmail.com, Bankkonto: 151100004, Volksbank Stuttgart eG, BLZ 600 901 00. Spenden sind steuerlich abzugsfähig.

Aŭstria Esperanto-Federacio / Österreichischer Esperanto-Verband

Postfach 39, 1014 Wien
aef@esperanto.at, www.esperanto.at

Aŭstria Esperanto-Junularo /

Österreichische Esperanto-Jugend

Weissgerberlande 30-36/5/11, 1030 Wien, aef@esperanto.at, http://aef.esperanto.at

Esperantomuzeo Viena /

Esperantomuseum Wien

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien, +43/1/53410-731, Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek, Josefsplatz 1, Postfach 308, 1015 Wien, plansprachen@onb.ac.at, www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm

UEA-ĉefdelegitoj kaj perantoj /

Bundesbeauftragte des Esperanto-Weltbundes UEA

Germanio / Deutschland

D-ro / Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, 55129 Mainz, (vespere / abends) +49/6136/46232, Wolfgang.Schwanzer@esperanto.de

Aŭstrio / Österreich

Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg, tel., fakso +43/2243/22052, aon.913548977@aon.at

Esperanto aktuel

ISSN 0942-024 X

31. Jahrgang

Eldonisto / Herausgeber

Deutscher Esperanto-Bund e.V., der Vorsitzende (v.i.S.d.P.)

Redaktisto / Redakteur

Stano Marček, Zvolenská 15/21, SK-03601 Martin, Slovakio.

Presejo / Druck

Alfaprint s.r.o. Martin, Slovakio

Esperanto aktuel havas ses numerojn jare kaj estas abonebla ĉe la komisiono por membropriorgado (vidu supre) por 18 € (24 € eksterlanden) jare.

Esperanto aktuel erscheint sechs Mal pro Jahr. Der Bezug ist im Mitgliedsbeitrag enthalten.

Anoncoj: Petu aktualan prezliston ĉe: deb@esperanto.de.

Anzeigen: Eine aktuelle Preisliste geht auf Anforderung (möglichst per Netzpost) zu.

Kontribuoj / Beiträge

Bv. sendi viajn kontribuojn por *Esperanto aktuel* 2012/4 ĝis la 15-a de julio 2012 al la redaktisto Stano Marček, elektronike al ea@esperanto.de. Bitte senden Sie Ihre Beiträge für *Esperanto aktuel* 2012/4 bis zum 15. Juli 2012 an den Redakteur Stano Marček, möglichst elektronisch an ea@esperanto.de.

Liebe Leser!

Ein Vorsitzender ist mit einem Tellerartisten im Zirkus zu vergleichen: Dieser lässt auf einer wachsenden Zahl von Stäben Teller rotieren und immer, wenn einer dieser Teller langsamer wird, springt der Artist hin und setzt ihn wieder in Bewegung. Je mehr Teller im Spiel sind, desto schwieriger wird es zu verhindern, dass einer abstürzt. Die Teller des Deutschen Esperanto-Bundes sind seine verschiedenen Aufgaben, insbesondere die Veranstaltungen. Die Teller werden in Schwung gehalten von den Aktiven, von den Vorstandsmitgliedern, Beauftragten, Angestellten, von den Ortsgruppen und Landes- und Fachverbänden. Immer, wenn einer irgendwo erlahmt, muss jemand hinspringen und einen Nachfolger besorgen, damit die Aufgabe weiterhin getan wird. Im Laufe der Jahre habe ich viele Teller selbst übernommen, 2013 muss für mich ein Nachfolger gesucht werden. Das wird umso leichter fallen, je mehr ich meine Teller in den kommenden Monaten abgeben kann. Werden auch Sie, lieber Leser, einen übernehmen?



Karaj legantoj!

Prezidanto similas al „telero-artisto“ en cirko. Tiu zorgas pri kreskanta nombro de teleroj, kiuj turniĝas sur bastonoj, kaj ĉiam, kiam unu el ili malplirapidiĝas, la artisto alsaltas kaj donas novan turniĝ-impulson. Ju pli da teleroj estas en la spektaklo, des pli malfacile estas eviti, ke telero terenfalas. La teleroj de Germana Esperanto-Asocio (GEA) estas ĝiaj diversaj taskoj, precipe la aranĝoj. Tiujn telerojn rotaciigas la aktivuloj, la GEA-estraranoj, -komisiitoj kaj -dungitoj, la aktivuloj de la lokaj grupoj kaj landaj kaj fakaj ligoj. Ĉiam, kiam ie iu eklamas, iu devas alsalti kaj trovi posteulon, por ke la tasko estu plu plenumata. Dum la jaroj pasis, mi mem transprenis sufiĉe multajn telerojn, en 2013 GEA devos trovi posteulon por mi. Tio estos des pli facila, ju pli da miaj teleroj mi povos transdoni dum la venontaj monatoj. Ĉu eble ankaŭ vi, kara leganto, transprenos unu?

Rudolf Fischer
prezidanto de

Germana Esperanto-Asocio

Mäzen stiftet wichtige Facharbeit für die Esperanto-Bibliothek Berlin

Seit dem 1. Mai 2012 arbeitet die Bibliothekarin Anja Eisemann im Berliner Büro (BerO) des Deutschen Esperanto-Bundes (D.E.B.). Sie wird die Esperanto-Bibliothek Berlin vollständig erfassen und katalogisieren. Angestrebt ist die Möglichkeit einer Fernleihe. Die Stelle wird komplett von einem Mäzen durch Zielspenden finanziert, die Verwaltung hat der stellvertretende D.E.B.-Vorsitzende Andreas Emmerich übernommen. *Esperanto aktuell* wünscht Frau Eisemann viel Erfolg und schließt sich dem Dank des D.E.B. an den großzügigen Mäzen an. (siehe auch S. 24f)

Mecenato fincas gravan fakan laboron por la Esperanto-Biblioteko en Berlin

Ekde la 1a de majo 2012 la bibliotekisto s-ino Anja Eisemann laboras en la Berlina Oficejo (BerO) de Germana Esperanto-Asocio (GEA). Ŝi komplete tralaboros la Esperanto-Bibliotekon en Berlin kaj kreos laŭsisteman katalogon. Celo estas plie, krei landvastan pruntepreneblon. La posteno fincas mecenato per celitaj donacoj, la administradon transprenis la vicprezidanto de GEA, s-ro Andreas Emmerich. *Esperanto aktuell* deziras al s-ino Eisemann multan sukceson kaj dankas kune kun GEA al la grand-anima mecenato. (vidu ankaŭ p. 24f)

Enhavtabelo/Inhalt

- 1 La bildtabulo pri Alfred Hermann Fried
- 2 Adresoj / Adressen
- 3 **Germana Esperanto-Asocio:** Karaj legantoj. Mecenato fincas gravan fakan laboron. Enhavtabelo
- 4 Sinprezento de Sibylle Bauer
- 5 **Aŭstria Esperanto-Federacio:** La rolo de Esperanto en la biografio de Alfred Hermann Fried. Semajno de Internacia Amikeco en Rumanio
- 6 Drei-Länder-Konferenz in Tschechien. Nova informilo pri Esperanto – en Esperanto
- 7 28-a Printempa Semajno Internacia okazis en Bonn. Papaj salutoj denove ankaŭ en Esperanto. Novaj kunredaktistoj por *Esperanto aktuell*
- 8 **Aŭstria Esperanto-Federacio:** Heroldo de Esperanto: Joseph R. Scherer
- 10 **El la landaj ligoj:** 40-Jahr-Feier des Esperanto-Sprachklubs Pfaffenhofen im Hotel Müllerbräu
- 11 **Rakontoj kaj anekdotoj:** Kuriozaĵoj el Esperantujo. Erfolge Veranstaltungen an der Münchner Volkshochschule
- 12 **Ni funebras kaj kondolencas.** Leteroj de legantoj
- 13 Bibliaj Tagoj 2012. Kiu organizas informstandojn?
- 14 **Interkultura Centro Herzberg:** Federacia agado „Bunteco bonas“ (Vielfalt tut gut). ICH enplektita en multaj kulturaj societoj
- 15 Laborgrupo Nacia Parko Harz aktivas kaj alvokas
- 16 **Esperanto en la amaskomunikiloj:** Medienecho. GEA danke ricevis
- 17 Retaj sukcesoj de Esperanto
- 18: **El Sarlanda Esperanto-Ligo:** Festliche Einweihung des Becker-Meisberger-Instituts im saarländischen Blieskastel
- 19 **Lingvopolitiko:** La Bonn-a deklaro nun dokumento de la Ĝenerala Asembleo de UN. Mallonge
- 20/21 **El la mondo**
- 23 **Bibliotekoj kaj arkivoj:** Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen
- 24: La sorto de „espoteko“. Führung für Esperantisten durch das Bundesarchiv in Berlin
- 25: Kenntnisse der Nachbarsprache
- 26 **Bibliotekoj kaj arkivoj:** Esperanto estonte en la Bavara Ŝtata Biblioteko
- 27 **kune – revueto de Germana Esperanto-Junularo:** Hallo, Freunde der Sonne! Bericht über die Vorstandssitzung: Deutsche Esperantojugend oder wie im Frühjahr 2012 alles anders wurde. Logowettbewerb - Wir haben einen Gewinner! Fahrtkostenzuschüsse für die diesjährigen Sommertreffen. Trovitaĵo. Famaj kantoj por ludi mem
- 31 **Kalendaro**
- 32 Novaj bildkartoj. La 90a GEK en Nürnberg

Karaj Esperantistoj!

Mi estas la novulo en la Berlina Oficejo. Mia nomo estas Sibylle Bauer, naskita en Heidelberg kaj ĉefe kreskinta en München. Tie mi aŭdis en la lernejo pri Esperanto. Jam tiutempe al mi plaĉis la imago, havi komunan lingvon kun ĉiuj miaj amikinoj, kiuj venis el Irano, Argentino, Israelo kaj Anglio, sed bedaŭrinde tiam ne estis eblo por ni lerni Esperanton.



Liebe Esperanto- Freunde!

Ich bin die Neue im Berliner Büro. Mein Name ist Sibylle Bauer, in Heidelberg geboren und größtenteils in München aufgewachsen. Dort hörte ich in der Schule von Esperanto. Mir gefiel schon damals der Gedanke, mit allen meinen Freundinnen, die aus Persien, Argentinien, Israel und England stammten, eine gemeinsame Sprache zu haben. Aber leider gab es keine Möglichkeit für uns, Esperanto zu lernen.

Kiam mi antaŭ nelonge serĉis donacon por amikino, mi ekhavis plezuron pri infano-libro en Esperanto. Sed mi ne povis donaci la libron sen koni la enhavon! Tial mi aĉetis leksikonon kaj serĉis en la Interreto ĉion pri Esperanto. Mi trovis Germanan Esperanto-Asocion kaj *Esperanto aktuell* kaj tiel konatiĝis kun simpatiaj Esperantistoj. Ekde tiam mi volis lerni Esperanton.

Tiutempe mi translokiĝis de Oderbruch al Berlino. En la novo domo mi konatiĝis, ankoraŭ dum la translokiĝo, kun Esperantistoj, kiuj fakte loĝis en la sama domo! Ili peris al mi privatan kontakton al Esperanto-instruistoj kaj ekde tiam mi lernas Esperanton.

Kial ĝuste Esperanton? Al mi plaĉas, ke ĉiu Esperanto-lernanto komencas ĉe si mem. Oni lernas fremdan lingvon sole kun la celo, kompreni aliajn kaj esti komprenata de aliaj. Oni tiel povas krei internan spacon de renkontiĝo, kaj estas egale, kie iu naskiĝis kaj en kiu sistemo kaj kun kiuj vivkondiĉoj iu vivas.

Sed ankaŭ se Esperanto estas multe pli facila ol niaj naciaj lingvoj – oni devas ĝin lerni! Ankoraŭ estas al mi malfacile, esprimi min en Esperanto. Do, mi petas indulgon.

Sibylle Bauer, gea.ma@esperanto.de

Als ich vor kurzem nach einem Geschenk für eine Freundin suchte, fand ich Vergnügen an einem Kinderbuch in Esperanto. Aber ich konnte das Buch nicht verschenken, ohne den Inhalt zu kennen. Also kaufte ich ein Lexikon und suchte im Internet nach allem über Esperanto. Ich fand den Deutschen Esperanto-Bund und *Esperanto aktuell* und lernte dabei nette Esperantisten kennen. Seitdem wollte ich Esperanto lernen.

Zu diesem Zeitpunkt zog ich vom Oderbruch nach Berlin um. Im neuen Haus lernte ich noch beim Umzug Esperantisten kennen, die tatsächlich im selben Haus wohnten! Sie vermittelten mir den privaten Kontakt zu Esperanto-Lehrern, und seitdem lerne ich Esperanto!

Warum ausgerechnet Esperanto? Es gefällt mir, dass jeder, der Esperanto lernt, erst einmal bei sich selbst beginnt. Man beschäftigt sich mit einer fremden Sprache einzig mit dem Ziel, andere zu verstehen und von anderen verstanden zu werden. Man kann so einen inneren Raum der Begegnung schaffen, egal, wo der andere auf die Welt gekommen ist oder in welchem System oder unter welchen Lebensbedingungen er lebt.

Aber auch wenn Esperanto viel leichter ist als unsere nationalen Sprachen: man muss es lernen! Es fällt mir noch schwer, mich in Esperanto auszudrücken, also bitte ich um Nachsicht.

Sibylle Bauer, gea.ma@esperanto.de

La rolo de Esperanto en la biografio de Alfred Hermann Fried

Efika kunlaboro inter GEA kaj AEF

Bildtabulo, kiu ilustras la rolon de Esperanto en la vivo de Alfred H. Fried, estis publike prezentita dum aprilo 2012 en la biblioteko de la „Arbeiterkammer“ de Vieno. Ĝi estas parto de migra ekspozicio dediĉita al tiu aŭstra nobelpremiito por paco kaj iniciatita kaj realigita de la publicisto prof. d-ro Walter Göhring. Entute 16 bildtabuloj vive skizas la biografion de la nobelpremiito.

Dum Alfred-Fried-simpozio, okazinta pasintan oktobron en la urbodomo de Potsdam, la ekspozicio estis prezentita la unuan fojon al la publiko. Tiam Roland Schnell donis al profesoro Göhring la

impulson krei apartan tabulon, kiu temigas la rolon de Esperanto en la vivo de Fried. La ideo tiom plaĉis al profesoro Göhring, ke li petis la helpon de la aŭstraj esperantistoj. La realigo okazis komence de 2012 per kunlaboro inter la Germana Esperanto-Asocio kaj la Aŭstria Esperanto-Federacio: dum GEA ebligis la projekton per rapida, favora kaj la ĉefa financa subteno, AEF respondecis pri la koncepto de la tabulo, la kunlaboro kun grafikisto kaj transprenis proksimume kvaronon de la kostoj. La Esperantomuzeo en Vieno kaj la arkivo de la Ligo de Nacioj en Genevo disponigis la bildan materialon.

La multkolora tabulo ilustras Esperanton kaj ĝian rolon en la kunteksto de la pacifisma movado kaj en la vivo de Fried: Gaston Moch atentigis lin en 1901 pri

Esperanto kaj jam kelkajn semajnojn poste Fried skribis sian unuan leteron en la Internacia Lingvo. Li membriĝis en la Viena Esperanto-Unuiĝo kaj en la Internacia Societo Esperantista por la Paco, verkis lernolibron kaj havis tre pozitivan sintenon por Esperanto.

Dum la venontaj monatoj la Fried-ekspozicio estos prezentita en diversaj urboj, interalie en pluraj lernejoj en Aŭstrio, en Budapeŝto, en Bayreuth kaj Nürnberg. La tabulo ne nur ĵetas lumon sur la profundan kaj seriozan okupon de Fried pri Esperanto, sed ĝi estas plia rezulto de la pozitiva, rapida kaj efika kunlaboro inter la germanaj kaj aŭstraj esperantistoj, kiu nun jam daŭras plurajn jarojn.

Bernhard Tuider

Atentigo: La kopirajton de la bildtabulo pri Fried havas prof. d-ro Walter Göhring.

Semajno de Internacia Amikeco en Rumanio

Plurfoje mi jam rekomendis pli atenti landon iom neglektitan ĝis nun – Rumanion! Denove mi profitis la ŝancon partopreni aranĝon aparte signifoplenan por ni Esperantistoj: La Semajnon de Internacia Amikeco (SIA) 2012.

Dum la akcepto en Busteni, en la jam „verdiĝanta“ hotelo MAGIC, kiun ni plene okupis, surprizis nin la tuta personaro per bonveniga, tradicia servado: Per pano, salo kaj „iom sekreta“ trinkaĵo. Sed plej impresa estis la Esperant-lingva bonvenigo flanke de la hoteldirektorino, kiu lastjare fakte promesis lerni Esperanton. Kiom da homoj jam

promesis tion kaj neniam faris, sed ŝi sincere okupiĝas pri nia komuna lingvo. Diligente ŝi partoprenis ĉiujn kursojn kaj enhotelajn aranĝojn kaj montriĝis ne nur afabla kaj simpatia, sed ankaŭ inteligenta. Cetere ŝi jam aliĝis por partopreni la anoncitan Esperanto-aranĝon en la Danuba Delto en junio.

Dank' al subtena kunlaboro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazis ankaŭ diversgradaj Esperanto-kursoj. Prof. Mihai Trifoi sperte solvis ĉion kaj reagis laŭ aktuala neceso. Partoprenante la kongreson de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF) en Herzberg

li certe kontribuos same aktuale kaj pozitive al la kunlaboro de IFEFF kaj ILEI. Ne estas mia tasko informi pri tiu ĉi grava movada evoluo, sed mi volas jen esprimi mian konsenton.

La aldonita foto prezentas la regintan etoson. Sinceran dankon al la organizinta Esperanto-grupo „Amikeco“ en Brasov, kies gvidantino estas la mondvaste konata IFEFF-prezidantino Rodica Todor. Dankon al ĉiuj kontribuintoj kaj ĝis la Danuba Delto!

Martin Stuppniĝ, honora membro de IFEFF, mastuppniĝ@gmx.at.



De maldekstre: Cristina Aldesiu, hotel-direktoro Carmen Covrig, Martin Stuppniĝ, IFEFF-prezidanto Rodica Todor kaj Laci Srek

Drei-Länder-Konferenz in Tschechien

In Břeclav/Lundenburg findet vom **27. bis 30. September 2012** erstmalig eine **Drei-Länder-Konferenz der tschechischen, slowakischen und österreichischen Esperanto-Vereine** statt.

Das südmährische Städtchen mit vielen Sehenswürdigkeiten, wie z.B. Schloss und Apollotempel, liegt an der Thaya und an der Grenze zu Niederösterreich. Das Thema der Konferenz lautet „Esperanto kiel vojo al ekkono de niaj najbaroj“. Es finden Arbeitstreffen, Seminare, Vorträge sowie optionale Ausflüge statt. Die Anmeldung ist für Mitglieder des Österreichischen Esperanto-Verbandes beim Vorstand möglich oder aber direkt bei den tschechischen Organisatoren. Als Vorbereitung für Anfänger kann der Sprachführer Deutsch-Esperanto „Sprache in Situationen“

von Herbert Mayer empfohlen werden (24 Seiten, 3€). Für Teilnehmer, die auch einige Wörter Tschechisch mit auf die Reise nehmen wollen, wird der „Sprachführer Tschechisch“ angeboten (in Esperanto, häufige Wörter und Phrasen mit Ausspracheerklärung; 32 Seiten, 1,35€). Nähere Informationen findet man auf www.esperanto.at („Dreiländerkonferenz“).

Resumo en Esperanto: Trilanda Konferenco 2012

En Břeclav/Lundenburg okazos de la 27-a ĝis la 30-a de Septembro 2012 komuna konferenco de aŭstriaĵ, ĉeĥaj kaj slovakaj Esperantistoj. La temo estos: „Esperanto kiel vojo al ekkono de niaj najbaroj“. Okazos laboraj kunvenoj, prelegoj, seminarioj, kultura kaj ekskursiva programo. Pli da informoj troveblas ĉi tie: www.esperanto.at („Trilanda Konferenco“) aŭ ĉe www.esperanto.cz.

Nova informilo pri Esperanto – en Esperanto

Aŭstria Esperanto-Federacio (AEF) eldonis novan, presitan faldfolion pri la Internacia Lingvo, en kiu legeblas tre mallonge kaj simple pri ĝia historio, pri lern-eblecoj kaj utiligado.

PRAKTIKO
Kulturo en Esperanto ekzistas libroj kun verkoj de Goethe, Shakespeare, Tolstoj... kaj internacia literatura. Cetero muziko, radio, teatro, gastejoj... „Pasporta Servo“ estas organizo kun 1200 Esperantistoj en 90 landoj. Vi estas gaste en la domo de Esperantisto, vizitas la landon kaj estas amiko – ne turistoj.

Novaj kontaktoj kaj amikoj,
per blanda lerno aŭ en interreto. Esperanto bone funkcias en internaciaj kontaktoj.

Ekzistas milionoj da Esperanto-paĝoj en interreto. Ne nur la libera enciklopedio Vikipedio, la gastejo Le Monde Diplomatique kaj Google estas en la internacia lingvo.

LERNI ESPERANTON
www.lernu.net
www.edukado.net

INFORMO en 62 lingvoj
www.esperanto.net

AŬDU la tekston
www.esperanto.at/informilo

ESPERANTO lingvo internacia

2012, AEF, Österreichischer Esperanto-Verband, Aŭstria Esperanto-Federacio, 1010 Wien, Perlebach 20

www.esperanto.at

KIO ESTAS ESPERANTO?
En 1887 doktrino L. L. Zamenhof prezentis la internacian lingvon: relative facile lernebla, senstila, regule gramatika.

Homoj en la tuta mondo lernas la lingvon Esperanto. Esperantistoj publikas librojn, gastejojn, muzikojn kaj organizas kongresojn.

En 1905 estis la 1-a Universala Esperanto-Kongreso kun 600 gastejoj el 20 landoj en Francio. (Boulogne sur Mer).

EL LA GRAMATIKO

Kio estas tiu? Tio estas libro.

„Mi estas Maria.“ „Ĝi estas Maria.“ „Mi amas vin.“

1 + 1 = 2
Unu kaj unu estas du.

Noma domo Malnova domo

Li trinkas Li trinkas Li trinkas

La mondo Lando Man Unu homo

Internaciaj kontaktoj estas granda parto de la moderna vivo: demokratia kaj senstila lingvo inter la nacioj estas bona ideo. Esperanto ne estas utopio, sed realo kaj funkcias en la tuta mondo.

Iom malkutime estas, ke la tuta teksto estas sen ia tradukaĵo, nur en Esperanto. Do temas pri „divenludo“ por interesatoj, kiuj emas kompreni la tekston per la helpo de montritaj grafikaĵoj el la libro *Esperanto per rekta metodo* de Stano Marček.

Antaŭ la presado AEF faris kompren-provojn kun kelkaj Aŭstrianoj, kiuj grandparte komprenis la tekston sen helpo. Ligilo al la faldfolio kiel PDF kaj al sondokumento kun la voĉlegita teksto: www.esperanto.at/informilo/.

28-a Printempa Semajno Internacia okazis en Bonn

Inter la 2a kaj la 9a de aprilo okazis la 28-a Printempa Semajno Internacia en Bonn. En tiu jam tradicia paska renkontiĝo, kiun okazigis la Germana Esperanto-Asocio kaj la Katolika Unuiĝo Esperantista, partoprenis 120 personoj el diversaj landoj.

Krom familioj, ankaŭ multaj plenkreskuloj kaj tuta junula grupo el Portugalio kun siaj instruistoj ĉeestis. Al la jam konataj kaj ŝatataj programeroj por infanoj apartenis diversaj manlaboroj, la MAZILINGVOKURSO kaj la kaosludo, dum kiu ankaŭ plenkreskuloj kuris tra la domo serĉante kaŝitajn paperslipojn kaj plenumante diversajn taskojn.

Ankaŭ seriozaj prelegoj, ekzemple pri la muzikisto Franz Liszt, la komparo inter planlingvoj aŭ la signifo de publikaj

rilatoj okazis en la taga programo. Ekskursoj kondukis partoprenantojn i. a. per trajne al la najbara urbo Köln, per ŝipo al la proksima kastelo „Drachenburg“ kaj per biciklo laŭ la rivero Rhein.

„Kiu volas iĝi milionulo?“, oni demandis vespere en la Esperanta versio de la mondvaste konata televida kvizo, kiun preparis junaj Esperantistoj el Britio kaj Germanio. Dum aliaj vesperoj oni ĝuis koncertojn kaj amuziĝis dum la prezento „Traumfresserchen“ (songovoruleto) de la profesia



pupateatraro Christof Frank. Poste eblis spekti ĝisnokte filmojn kun zorgeme esperantigitaj subtekstoj.

Jam eblas informiĝi pri la venontjara 29a PSI en St. Andreasberg en la Harcomontaro ĉe www.esperanto.de/psi.

Papaj salutoj denove ankaŭ en Esperanto

Ankaŭ ĉi-jare okaze de la Pasko-festo la Papo salutis „la urbon kaj la mondon“ i.a. en Esperanto.

Aktivuloj el Romo ĉiam profitas la okazon, varbi per ŝildoj kun grandaj literoj ESPERANTO por nia lingvo. Inter tiuj estis ĉi-foje ankaŭ Hermann

Kroppenberg (sur la bildo la 3a ŝildportanto de dekstre), komisiito de Germana Esperanto-Asocio pri Esperanto-eŭro en la amaskomunikiloj (vidu p. 16). (voko)



Novaj kunredaktistoj por Esperanto aktuell

Ĝis nun Rudolf Fischer estis la pli-malpli oficiala kunredaktisto por Esperanto aktuell.

Li kolektas ĉiujn kontribuojn, elektas kaj antaŭpreparas ilin por kontrolo de la lektoroj. La fina rezulto kun provizora paĝoskemo iras tiam al la redaktisto Stano Marček, kiu kompilas el la tuto la novan numeron. Por malŝargi Rudolf Fischer troviĝis nun du aliaj kunredaktistoj, nome Martin Schäffer kaj Yashovardhan. Germana Esperanto-Asocio jam antaŭdankas ilin. Elektronika sendoadreso por ĉiuj kontribuoj restos ea@esperanto.de.

Heroldo de Esperanto: Joseph R. Scherer

El lia postlasaĵo en la Kolekto por Planlingvoj (Vieno)

Joseph Roman Scherer estis tre populara figuro en la Esperanto-movado de la intermilita tempo. Ĉiu konis lian nomon, ĉiu admiris liajn neelĉerpeblan energion kaj evidentan sentimon, ĉiu aplaudis lian tre efikan agadon por Esperanto. Altstatura, elokventa, fajnvizaĝa, edukita, li estis la perfekta ambasadoro de sia afero, heroldo de senantaŭjuĝa internacieco, de diligenta entreprenemo, de kuraĝa rigardo antaŭen, de Esperanto.



Liaj kalkuleblaj atingoj estas mirigaj: Li instruis Esperanton al miloj da homoj, fondis la sukcesan Esperanto-klubon de Los Angeles, prezidis la Amerikan Esperanto-Akademion kaj la Esperanto-Asocion de Norda Ameriko, verkis tri librojn kaj sennombrajn gazetartikolojn en diversaj lingvoj. Lia majstroverko tamen estas la realigo de knaba revo, kiu tute ŝanĝis lian vivon – kaj tion de multaj aliaj homoj.

Aventuremo, maltrankvileco kaj sopiranta revemo estis la netipaj kvalitoj, kiuj vokis junan svisan bankoficiston el sia hejmo eksteren, malproksimen. Naskiĝinte en 1901 en svisa burĝa familio, Joseph R. Scherer jam kiel knabo vagadis tra la montara ĉirkaŭaĵo de sia hejmurbo Luzern, kie li baldaŭ konis ĉiun arbuston kaj ĉiun ŝtonon. Konatiĝinte kun Esperanto la ne tre riĉa junulo tuj kaptis la ŝancon, konsiderinde plivastigi la radiuson de siaj aktivecoj. Li trovis amikojn en Anglio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Italio, komencis viglan korespondadon inkluzive vizitvojaĝojn

„La gefratoj multe surpriziĝis kaj kore amuziĝis, kiam ni elsuĉis la bongustan lakton per kaŭĉukaj tubetoj, sen perdo de eĉ unu guto kaj ne malpurigante niajn ĉemizojn. Ili tuj mem volis provi la fenomenan metodon. Ili ĝojegis kiel veraj infanoj. La ĝojo fariĝis senlima, kiam mi donacis la tubeton al la plej juna el la trio.”

Jen unu el la multaj gajaj travivaĵoj de Joseph R. Scherer dum lia mondvojaĝo: Post longa marŝado kun sia amiko Nick Slinger en la varmego de Siamo li soifante petis geknabojn per mangestoj pri kokosnukso. Fine ili alportis unu – kaj estis rekompenditaj per stranga instrumento: ilia unua trinktubeto.

kaj entuziasme partoprenis kongresojn. Kaj li nepre volis dividi siajn spertojn kun aliaj. Detale priskribante la okazintaĵojn artikolforme kaj fotografante multe, li memstare pli kaj pli ellernis la metion de ĵurnalisto.

En 1924 Scherer elmigris al Usono, kaj tie lia agemeco kvazaŭ eksplodis. Liaj esplorvojaĝoj kondukis lin en la *Rocky Mountains*, en la *Grand Canyon*, en la dezerton. Tiuj travivaĵoj ne kvietigis, sed instigis lin al ĉiam pli grandaj aventuroj. Kaj lin, kiu konis tiom da belaj lokoj en Eŭropo kaj Usono, allogis la mondo. Sed eĉ por Scherer, la pasia vojaĝemulo kaj kontaktema esperantisto, mondvojaĝo estis grandega entrepreno kun neakcepteblaj riskoj.

Helen Davis diris pri la senripozulo, ke li havas tri hejmurbojn: *Los Angeles*, *Long Beach* kaj *Hollywood*.¹ Kaj tie li nun kvazaŭ hobia – profesie li denove estis bankoficisto – nodis ĵurnalistajn kontaktojn al la fikcia mondo de la filmo. Li intervjuis famajn aktorinojn, reĝisorojn kaj direktorojn de grandaj entreprenoj, kaj neniam forgesis varbi inter ili por Esperanto.

Sed la reala mondo neniam ĉesis voki. Iam Scherer turnis sin al Robert Kreuz, la direktoro de la Internacia Centra Komitato de Esperanto, por loĝistika subteno de eventuala mondvojaĝo. Dum preskaŭ unu jaro la du agemaj viroj el svaga vizio ellaboris precize planitan projekton.

¹ Nachlass Scherer, V10/W11/25

Scherer por la vojaĝo oficiale ricevis la titolon „Speciala Delegito de Internacia Centra Komitato“. La solvon de multaj „teknikaj kaj taktikaj detaloj“² pere de Kreuz Scherer intencis rekompenci per ĵurnalista kaj propaganda laboroj. Li jam delonge estis libera kunlaboranto de la revuo *Heroldo de Esperanto* de Teo Jung, kaj al tiu la plej aktualaj vojaĝraportoj devis esti sendataj akurate.

Heroldo de Esperanto, tio fakte iĝis Joseph R. Scherer dum sia vojaĝo, kiun li komencis la 17an de septembro 1930 per ŝipo kurse al Honolulu. Certe por li mem tre gravis liaj aventuroj, la momentoj de angoro kaj teruro, kaj liaj „brilmomentoj“³. Li marŝis senarmile tra ĝangalo, kie li ĉiumomente atendis la atakon de sovaĝa besto, li trovis

mortovilaĝon plenan de nevivaj homaj korpoj, kiuj estis surprizitaj de erupcio de la vulkano Merapo, li estis kaptita de la polico en Java kaj ĵetita en arestoĉelon, sed li ankaŭ pasigis romantikajn noktojn sur la strando en Cejlono, lasis sin ensorĉi de la tera paradizo Bali, staris senkomprene miregante antaŭ la templo de Angkor-Vat kaj tranoktis sur la pinto de la Keops-piramido.

Por la tiama mondo gravis ĉefe, ke li estis en ĉiu senco tiu heroldo de Esperanto, tiu escepta peranto inter diversaj medioj, kiu plektis ligilojn inter la kontinentoj, inter la fikcia mondo de la filmo kaj la realeco, inter la Esperanto-komunumo kaj la ne-Esperanta publiko. Dum sia vojaĝado li plenumis diplomatajn misiojn, ekzemple li portis permane salutleterojn de la urbestroj de Los Angeles kaj San Francisco al tiuj de japanaj kaj ĉinaj grandurboj, li parolis en la plej gravaj studioj de la japana filmmetropolo Kioto pri ilia granda modelo Hollywood, li faris dum siaj ekzakte 500 vojaĝtagoj ekster Ameriko 320 paroladojn kun

pli ol 50.000 aŭskultantoj, li prelegis pri Esperanto en radio en multaj urboj de la mondo, kaj la nacia kaj regiona gazetaro ĉiam tre amplekse raportis pri li kaj lia entrepreno.

Kaj tute ne forgesinda estas la alvoko de Scherer, alsendi materialon al la Esperanto-Muzeo en Vieno por savi la materialon de pereoj.⁴

En la jaroj 1936 kaj 1937 Joseph R. Scherer denove vizitis Eŭropon por ampleksa prelegvojaĝo. Siajn kontaktojn al Hollywood li daŭre uzis por konatigi Esperanton en la iluzifabrika. 1940 li instruis al Dorothy Lamour kaj Bing Crosby kanti Esperantan tekston por la filmo *Road to Singapore*.⁵

Poste li tamen iom kvietigis kaj el la moviĝemulo iĝis zorgema edzo kaj patro. Kaj ankaŭ la bruo ĉirkaŭ li silentiĝis. Kiam Joseph R. Scherer mortis en 1967, aperis simpla, unufraza informo en la funebra rubriko de *Heroldo de Esperanto*.⁶

Christian CIMPA

⁴ Scherer, p. 250f.

⁵ *Heroldo de Esperanto*, 1946/1, p. 5

⁶ *Heroldo de Esperanto*, 1967/12, p. 4



40-Jahr-Feier des Esperanto-Sprachklubs Pfaffenhofen im Hotel Müllerbräu

Rund 30 Personen, unter ihnen Bürgermeister Thomas Herker, Stadtrat Helmut Stadler, der Landesvorsitzende Bernd Krause, mehrere Vertreter anderer bayerischer Esperanto-Vereinigungen sowie zahlreiche Ortsmitglieder konnte Klubvorsitzender Franz Knöferl zum 40jährigen Jubiläum des Esperanto-Sprachklubs Pfaffenhofen am 21. April 2012 im Hotel Müllerbräu begrüßen.

Bürgermeister Thomas Herker stellte sich den Teilnehmern vor seinem Grußwort in fließendem Esperanto vor.

„Genaugenommen feiern wir heute ja gleich mehrere Jubiläen, denn die Esperanto-Sprache selbst besteht heuer seit genau 125 Jahren“, begann Franz Knöferl, der den Sprachklub fast auf den Tag genau seit 30 Jahren leitet, seinen kurzen Vortrag über die emotionale Rolle, die eine gemeinsame neutrale Sprache wie Esperanto in Europa spielen könnte.

Eine gemeinsame Sprache sei neben gemeinsamer Geschichte, Werte, Weltanschauung, Flagge und Hymne ein entscheidendes und unverzichtbares Kriterium für das

Zusammengehörigkeitsgefühl der Europäer, so Knöferl. Mit einer neutralen Sprache könnte Europa seinen selbst gestellten Anspruch, eine Gemeinschaft demokratischer Staaten zu sein, um das Ziel, gleichberechtigte Staaten zu sein, erweitern. Denn die Rolle, die National- und Regionalsprachen für die Identität und das Zusammengehörigkeitsgefühl der jeweils dort lebenden Menschen spielen, diese Rolle - eine Identität für alle Europäer - wird zweifelsohne in Europa eine immer größere Bedeutung gewinnen. Hier bietet sich Esperanto als nationalitätsunabhängige Sprache geradezu zwingend an, wenn wir im Europa der Zukunft nicht nur eine gefühlsmäßig von oben gesteuerte Gemeinschaft bleiben wollen, sondern

auch eine von unten getragene emotionale Gemeinschaft werden wollen. Das hätte auch eine enorme Signalwirkung für die Welt.

Klubmitglied Josef Lechermeier trug die von ihm selbst ins Esperanto übersetzte Kurzgeschichte „Der Stammvater der Bayern“ (La prapatro de la bavaroj) vor. Danach gab es Ehrungen für langjährige Mitglieder. Sprachkursbeauftragter Gustav Neumair, der auch bereits Gründungsmitglied des Vereins war, erhielt ebenso wie Anneliese Altmann ein Präsent als Dank für über 40jährige Klubtreue und Franz Knöferl für 30 Jahre Vorsitz.

Im Anschluss an die Ehrungen hielt Klubmitglied und Sprachwissenschaftler Roland Hemmauer einen spannenden Vortrag über seine Forschungsarbeit in dem kleinen südamerikanischen Land Surinam, wo er im Auftrag der niederländischen Forschungsförderung (NWO) die vom Aussterben bedrohte karibische Sprache Katwena dokumentiert hatte.

Franz Knöferl



Bürgermeister Thomas Herker (rechts) gratuliert Franz Knöferl (Mitte) im Beisein von Stadtrat Helmut Stadler (links).
Foto: Manfred Eibisch, Pfaffenhofener Kurier



Kuriozaĵoj el Esperantujo

Antaŭparolo de la aŭtoro: La sekvaj kuriozaj kaj anekdotecaj eldiraĵoj rilate al Esperanto ne estas de mi elpensitaj. Mi aŭdis ilin propraorele dum mia pli ol tridekjara aktiva partopreno en la Esperantovivo de Berlino. Kvankam mi bone rememoras la koncernajn personojn, mi prisilentos iliajn nomojn, por eviti, ke iu sentu sin ofendita.

Gerd Bussing

Negrava demando

Kadre de la programo en nia iama renkontiĝejo „Mittendrin“ ni aŭdis prelegon de faksperta samideanino pri la familio Zamenhof. Poste kelkaj ĉeestantoj havis ankoraŭ demandojn, al kiuj la preleginto volonte respondis. Ankaŭ mi havis demandon, sed trovante ĝin iom flanka, mi nur post la fino de la oficiala parto de la aranĝo kuraĝis prezenti ĝin. „Pardonu, mi havas ankoraŭ unu demandon al vi, kvankam mi pensas, ke ĝi estas ne tre grava.“ – „Kuraĝe demandu! Negravaj demandoj ne ekzistas.“ – „Nu, min interesas, ĉu vi ion scias pri deveno de la nomo Zamenhof...“ – „Ĉu pri la deveno de la nomo? Ne, pri tio mi ne okupiĝis. Sed tio, cetere, estas tute negrava demando!“

Morta lingvo

Instigite de niaj anoncoj en gazetoj, komence de la naŭdekaj jaroj de tempo al tempo venis ĵurnalistoj por raporti pri niaj aranĝoj. Iun tagon ĵurnalistino de berlina taga gazeto vizitis unu el niaj vesperoj en la kafejo „Mittendrin“. Mi renkontis ŝin antaŭ la enirejo, kie ŝi tuj komencis min demandi pri Esperanto, pri kiu ŝi evidente nenion sciis krom la nomo, tamen asertante, ke „ĝi ja

estas morta lingvo, neniuj parolas ĝin.“ Mi pacience provis klarigi al ŝi, ke mi konas multajn homojn, kiuj parolas tiun lingvon, ekzemple ni, pri kio ŝi tuj povos konvinkiĝi, ĉeestante nian kunvenon. „Nu, pro tio mi ja venis, kvankam... ĝi ja estas morta lingvo!“ Mi menciis, ke ekzistas kongresoj, literaturo, teatraĵoj k.t.p. Sed al ĉiuj miaj argumentoj venis la respondo: „sed ĝi ja estas morta lingvo!“ Ŝi partoprenis nian kunvenon, en kiu ni vigle diskutis kaj babilis kaj tradukis por ŝi. Ŝia artikolo, kiu aperis kelkajn tagojn poste, ne estis tre favora. En ĝi ŝi ripetis sian opinion, ke „Esperanto estas morta lingvo“ kaj moke asertis, ke „kunvenis ĉefe maljunuloj“. Se mi bone rememoras, la plej maljuna estis mi, havante tiam 55 jarojn...

Rimarkigo de la redaktisto: *Esperanto* *aktuell* kore gratulas al Gerd Bussing pro lia 75a naskiĝ-datreveno.

Erfolgreiche Veranstaltungen an der Münchner Volkshochschule

Nach den beiden Veranstaltungen an der VHS München-Pasing im Jahre 2011 (Motto: „100 Jahre Esperanto in Pasing“) ist es Norbert Gütter, dem Vorstandsmitglied des Esperanto-Klubs München, auch 2012 gelungen, zwei gut besuchte Informationsabende durchzuführen.

In der VHS München-Sendling lautete das Thema am 4. Mai: „Plansprachen in Geschichte und Gegenwart“ und am 11. Mai: „125 Jahre Esperanto: Die Erfolgsgeschichte einer Sprache - mit Schnupperkurs“. Herr Gütter leistete auch hervorragende Pressearbeit mit zwei Artikeln in der Stadtteilzeitung.

Esperanto hat jetzt einen guten Stand in der Münchner Volkshochschule. Es ist seit mehreren Jahren im Programm

zu finden und wird in Annoncen zum Sprachenangebot explizit genannt. Mit Norbert Gütter hat der Esperanto-Klub München einen guten Leiter für Informationsveranstaltungen gefunden und seit 2008 sieben erfolgreiche Vorträge und Schnupperkurse an der VHS anbieten können.

Fritz Hilpert

Esperanto-Klub München e.V.

Zwischen Utopie und Wirklichkeit: Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt.

**Ausstellung vom 5.6. bis 9.9.2012 in der Bayerischen Staatsbibliothek, Ludwigstraße 16, 80539 München. Mo-Fr 10-17 Uhr, Do bis 19 Uhr; 15.8. geschlossen
Öffentliche Führungen (1 Stunde, kostenlos, ohne Voranmeldung): 27.6, 10.7. und 3.8. jeweils um 17 Uhr**

Forpasis prof. d-ro Makabe, sciencisto kaj esperantisto

La 7-an de aprilo forpasis en sia domo prof. d-ro Rokuro Makabe kelkajn tagojn antaŭ sia 82a naskiĝdatreveno.

S-ro Makabe naskiĝis en la jaro 1930 en la japana urbo Nagata, kie li ankaŭ studis medicinon. Dum sia studado li lernis la germanan kaj Esperanton. Ambaŭ lingvoj iĝis tre gravaj por lia vivo. La germana – ĉar scipovo de ĝi ebligis al li iĝi stipendiulo de DAAD (Deutscher Akademischer Austauschdienst) en la jaro 1961 kaj veni al la Universitata Klinikum de Frankfurto, Esperanto – ĉar ĝi jam en Japanio malfermis al li la fenestron al la mondo. „Esperanto estis post la Dua Mondmilito en Japanio tre disvastigita. Eksterlando estis por ni tre fora kaj mi multe korespondis en Esperanto“, li diris dum unu el siaj intervjuoj. Tial en Frankfurto li tuj kontaktis esperantistojn. Amikeco inter li kaj prof. d-ro Selten ekestis kaj vivis ĝis la fino.

Li intencis resti en Germanio eble du jarojn. Sed konatiĝo kun juna kuracistino iĝis lin resti pli ol 50 jarojn. Li havis kvin infanojn kaj 13 nepojn.

S-ro Makabe iĝis okulkuracisto, kaj gvidis ekde 1973 ĝis 1996, kiam li emeritiĝis, la sekcion por funkciodiagnoziko kaj laser-radia terapio. Dum multaj jaroj li kunlaboris kun Max-Planck-instituto por oftalmologia elektrofiziologio kun la celo plibonigi la interdisciplinan kaj internacian kunlaboron. Li peris tien multajn japanajn sciencistojn.

Laŭ analizo el la jaro 1995 li apartenis al la internacie plej ofte cititaj germanaj sciencistoj de sia fako.

S-ro Makabe skribis pli ol 160 sciencajn publikaĵojn – ankaŭ en Esperanto. Li tradukis malgrandan sed gravan broŝuron „Nicht so, sondern so“ (Ne tiel, sed tiel



ĉi) eldonita de la Deutscher Blinden- und Sehbehindertenverband (Germana Asocio de Blinduloj kaj Vide Handikapitoj). Li tradukis ĝin en Esperanton kaj la japanan. La libro estis uzata en japanaj lernejoj por instrui infanojn kiel ili povas helpi al blinduloj. Malgranda libro – sed gravega.

Por sia laboro li ricevis du ordenojn: unu de Japanio – la Ordenon de Sankta Trezoro kun oraj radioj, kaj unu de Germanio – la Federacian Meritkrucon (Bundesverdienstkreuz am Bande). Japano konsulo diris ĉe transdono de la ordeno, ke li signife kontribuis al komuna esploro de japanaj kaj germanaj sciencistoj.

Prof. Makabe estis tre trankvila homo ne multe parolanta, nek pri siaj sciencaj sukcesoj nek pri siaj subtenoj en diversaj partoj de la Esperanto-movado. Tamen lia nomo estis konata. Precipe aŭskultantoj de diversaj radioelsendoj en Esperanto konis lin. Li ofte korespondis kun redakcioj kaj ili ofte citis el liaj leteroj. S-ro Osmo Buller diras en sia kondolencletero „...Tio estas vere granda perdo al UEA, kies dumviva membro kaj fidela apoganto li estis, sed aparte al ĉiuj multaj gesamideanoj tra la mondo, kies amiko li estis“ kaj „Li estis unu el tiuj mirindaj homoj, kiujn ni povis ekkoni dank' al Esperanto.“ Fine li estis ankaŭ honora membro de Esperanto-Societo Frankfurto ĉe Majno.

Katharina Eckstädt

Hans Heinel (1925-2012)

La 4-an de aprilo 2012 forpasis la iama prezidanto de GDREA (1981-1990) Hans Heinel. Li grave helpis al la evoluigo de la Esperanto-movado en GDR.



Leserbriefe / leteroj de legantoj

125 Jahre Esperanto - der Beweis

... ich dachte, nachdem der Appell in der letzten *Esperanto aktuell* nochmal so eindringlich war, ich sende hier mal den Beweis, dass es auch aktive Mitglieder gibt, die für Esperanto die Werbetrommel rühren.

Viele Grüße und ein schönes Wochenende,

Marc Hanisch,

marc.hanisch@gmail.com

(neue Kontaktadresse des D.E.B.
in Potsdam).

Red.: Er hat ein Bild von Werbekärtchen beigefügt, die auf die Jubiläumsaktion aufmerksam machen. Eine sehr gute Idee, so war es gedacht!

... mi ĵus ricevis la numeron 2012/2 de *Esperanto aktuell*. Sur paĝo 20 aperas serio da arabaj literoj. Temas jes pri la ĝustaj sed la sinsekvo estas malĝusta, nome dekstren anstataŭ maldekstren. ... Kun multaj salutoj

Yashovardhan,

yasho@t-online.de

Bibliaj Tagoj 2012


Ekde kelkaj jaroj kuniĝas grupo de esperantistoj sub la titolo „Bibliaj Tagoj“. La grupo renkontiĝas jare ie. De la 7a ĝis la 11a de marto 2012 ili estis en Trento.

Trento estas urbo en la nordo de Italio en historie eminenta regiono: La antikvaj romianoj fondis la urbon kaj nomis ĝin „Tridentum“. Tial la loĝantoj nomiĝas ankoraŭ hodiaŭ „tridentoj“. Ekde la mezepoko apartenis la urbo al Tirolo kaj nomiĝis Trient. De 1545 ĝis 1563 en la katedralo koncilio de la katolika eklezio reagis je la Reformacio kaj decidis agadojn kontraŭ la reformantoj. Ekde 1363 apartenis Tirolo al Aŭstrio. La tirola ĉefurbo estis Innsbruck. Dum 1809 batalis tirolanoj sub Andreas Hofer kontraŭ Francio kaj Bavario. Ekde 1809 la parto sude de monto Brenner apartenas al Italio. Suda Tirolo konsistas el 2 provincoj: Bolzano kaj Trentino. En la provinco Bolzano loĝas ca. 490.000 homoj; 69% parolas la germanan, 26% la italan, 4% la ladinan (reti-romanĉan) lingvojn. En Trentino loĝas 453.100 homoj: la plej multaj parolas la italan lingvon. 1923 ĉiuj germanaj nomoj

devis esti italigataj: „Trient“ estiĝis „Trento“; „Etsch“, la rivero tra Trento, estiĝis „Adige“. Ĉar la minoritatoj estis subpremataj, tiroloj batalis, ankaŭ per atencoj.

Sed la partoprenintoj de la Bibliaj Tagoj loĝis pace en la monaĥejo „Madonna delle Laste“ ĉe la rando de la urbo sur monto. Partoprenis italoj, germanoj, ĉeĥo, slovako, hungaro, entute ĉ. 20. Ni kantis, preĝis, ĝuis arton, naturon. Ni vizitis najbarajn lokojn: en Rovereto la sonorilon memore al militmortigitoj, en Riva la belegan Gardan Lagon, en Borgo Sacco ni vizitis ortodoksan preĝejon kaj en Arco ni travivis evangelian diservon. En Trento ni rigardis la Ekumenan Centron kaj festis tie Sanktan Meson. Ĉion ĉi organizis perfekte Stefan Lepping el Werl por niaj edifo, klerigo, ĝuo. Neelparolite validis la moto de reĝo, kiu naskiĝis antaŭ 300 jaroj: „Ĉiu estiĝu beata laŭ sia maniero!“

Ulrich Wilke



Kiu organizas inform-standojn?

Ili estis bona tradicio: la informstandoj dum la ĉiujaraj kunvenoj de Katolikoj kaj Protestantoj. Allasatas nur religiaj, ne-politikaj grupoj, krome junularaj (do, ekzemple ankaŭ ne Germana Esperanto-Asocio, sed jes Germana Esperanto-Junularo).

Ulrich Matthias, kiu organizis antaŭe informstandojn dum la Katolikaj Tagoj, kunfondis „Eine-Welt-Partei“ kaj volis per ĝi partopreni ĉi-jare en Mannheim, sed ho ve! Lastmomente la organizantoj retiris la permeson, tiel ke en 2012 tute mankis informstando, kiu varbas por Esperanto.

Por ke Esperanto reaparu inter progresemaĵoj Kristanoj, jen alvoko: Kiu estonte pretas, zorgi pri informstando? Por la Protestantoj tion devus fari Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI), sed ankaŭ ili bezonas freŝajn fortojn. Oni devas unu jaron antaŭe (!) jam zorgi pri la formalajoj (oficiala aliĝo ktp.). Loke trovendas aktivuloj, kiuj prizorgas la standon. Germana Esperanto-Asocio (GEA) liveradis materialon kaj (post peto) ĝis nun ankaŭ pagis grandegan parton de la elspezoj. Informemaj aktivuloj turnu sin al la GEA-estraro.

Rudolf Fischer



Stefan Lepping kantas kun ni kaj ludas antaŭ la sonorilo
Fotis: Ulrich Wilke

Federacia agado „Bunteco bonas“ (Vielfalt tut gut)

Antaŭ ĉ. tri jaroj la Esperanto-Centro en Herzberg komencis kunagadi en la publika programo ĉe la subdistrikto Osterode am Harz kontraŭ rasismo kaj malamo al fremduloj.

Okazis multaj komunaj kaj publikaj agadoj, ekz. kantado en Esperanto en diversaj urboj en la regiono. Ankaŭ la iama ĉefo de la subdistrikto diris, ke Esperanto estas bona rimedo por nia regiono.

Intertempe Zsófia Kóródy fariĝis membro de la regiona komitato kaj ofte partoprenis ĉe kunsidoj kaj publikaj eventoj. Tio estas bona varbado por Esperanto.

Vaste nia subdistrikto varbas per la slogano „Komune kontraŭ RASISMO“. Antaŭnelonge oni pentris en grafito-stilo en najbara urbo muron de la junulardomo kun bildoj rilate al amikeco kaj kun kelkaj verdaj steletoj.

Ekzistas reklambendoj kun tiu ĉi jam ŝatata teksto, stampilprintaĵoj sur kovertoj, ktp.

La plej nova projekto estas reklamportantaj subglasoj kun la teksto en kvar lingvoj, tamen la teksto en Esperanto estas la plej okulfrapa. Tion la subdistrikto nun disdonadas al restoracioj kaj hoteloj en la regiono.

Do, Esperanto estas ĉiam pli kaj pli vaste uzata, daŭre disvastigata kaj konata en Herzberg... la Esperanto-urbo kaj en la regiono.

Peter Zilvar

ICH enplektita en multaj kulturaj societoj

Esperanto-Societo Südharz kaj la GEA-filio por klerigado kaj kulturo (ICH) en Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, dum la lastaj jaroj plektis kontaktojn al aliaj lokaj kaj regionaj kultur-asocioj. Ŝajne ni atingis la „ekigan amason“ je favoro por Esperanto. Por la legantoj ni donas kelkajn pozitivajn ekzemplojn.

Partnereco kun „Futurateliero Herzberg“ (Zukunftswerkstatt Herzberg)

Nia unua partnerasocio estis la Futurateliero Herzberg (Zukunftswerkstatt Herzberg). Ĝia prezidantino Gesine Langenkamp mem estas membro de nia asocio, lernas Esperanton kaj regule partoprenas la klubkunvenojn. Komune atingita rezulto estis la instalado de dulingvaj informtabuloj laŭ la enurba promenvojo Akvo-8 kaj Arboinstrupado ĉirkaŭ la Jues-lago.

Novaj komunaj projektoj estas en preparo.



Partnereco kun la Subtenasocio de la kastelo kaj kastela muzeo

Alia pozitiva ekzemplo estas la membreco de nia loka Esperanto-klubo ĉe la kastela kaj muzea subtenasocio. Ni estas veraj partneroj en la muzeo kaj devas agi laŭ ties normoj. Ankaŭ sur la speciala hejmpaĝo de la kastela muzeo oni mencias, ke la Esperanto-Centro nun estas konstanta kooperativa partnero en la kastelo. Ĉ. 15.000 homoj dum la jaro, nemalmultaj el najbaraj landoj kaj foraj regionoj, vizitas la kastelan muzeon enhavantan specialajn Esperanto-fakekspoziciojn.

Membreco kun Karstwanderweg Südharz

Ni estas membroj ankaŭ ĉe flegantoj de la karsta migradvojo Karstwanderweg Südharz. Tio estas longa migradvojo de Osterode am Harz, tra Herzberg, Bad Sachsa, Nordhausen, Eisleben preskaŭ ĝis Halle/Saale. Ekzemple ni rajtas traduki la hejmpaĝajn tekstojn el la germana al Esperanto.

Partneraj rilatoj kun la Hejmlanda kaj Historia Asocio

La loka hejmlanda kaj historia asocio same estas grava partnero, kiu bonvenigas Esperanton.

Mi jam ekde jardekoj estas membro de la surloka Harzklub, sed nur lastjare Esperanto-Societo Südharz membriĝis kiel asocio ĉe Harzklub. En marto 2012 ili invitis nin ne nur ĉeesti ilian jarĉefkunvenon sed prelegi tie pri la lingvo Esperanto. El tiu bona kunlaboro naskiĝis nova iniciato: la Esperanto-Centro sponsoris unu el la benkoj, kiujn la loka klubo de migrantoj starigis en la regiono. En la dors-apogilo de la lignobenko estas gravurita per grandaj, bone videblaj literoj: Esperanto-benke kaj en angulo la dato: Marto 2012. La benko invitas al ripozado proksime al la hospitalo, sur montoflanko, de kie estas bela panoramo al la urbo.

Ni daŭrigas tiujn kunagadojn kun lokaj ne-esperantistaj grupoj, kluboj, asocioj, ja per ili eblas komprenigi niajn celojn kaj trovi subtenemon en ekstermovadaj randoj. Tio tre gravas en Herzberg, kie ĝuste per tiuj agadoj la loĝantaro pli kaj pli sentas solidarecon kun la idearo de Esperanto kaj formas pozitivan opinion pri la lingvo kaj lingvoparolantoj.

Peter Zilvar

Laborgrupo Nacia Parko Harz aktivas kaj alvokas

Antaŭ du jaroj vizitis nian Esperanto-Centron d-ro Knolle, kiu estas la ĉefo por evoluigo ĉe la Nacia Parko Harz. Dum kelkaj horoj ni interparolis pri multaj punktoj de komuna agado. La kreemaj ideoj fluis sur paperon.

Ankaŭ oficistino de la urbo Herzberg ĉeestis kaj protokolis la komunajn praktikajn paŝojn.

Unue oni pensis pri tradukado de tekstoj el la hejmpaĝo de la Nacia Parko Harz al Esperanto. Ankaŭ flugfoliojn, ekz. pri la temoj „La linko“, „Ĉirkaŭ Lonau“, „Animpado“ ni povos traduki kaj eldoni. Gabi Oturai el Frankfurt am Main transprenis la kunordigon de la tradukitaj tekstoj. Jam ĉ. 9 tradukistoj helpas esperantigi taŭgajn tekstojn. Krome oni kreas komunan fakvortaron ĉe google-docs.

Certe baldaŭ aperos la Esperanto-flageto sur la hejmpaĝo de la Nacia Parko Harz. La administracio havas la sidejon en Wernigerode. Unu el ĉefceloj estas starigo de t. n. Esperanto-migradrondvojo, ekz. de Herzberg am Harz, tra Lonau, al Hanskühnenburg, eble al St. Andreasberg, al Sieber al la monto Großer Knollen kaj reen al Herzberg. Tio estos ne nur virtuala vojo, sed reala migradvojo kun dulingvaj vojmontriloj, klarigoj. En la realo oni varbos por la Nacia Parko kaj Esperanto.

Tio bone koincidas kun la daŭripova grandprojekto „Herzberg am Harz ... la Esperanto-urbo“. Jam nun ni invitas al la venonta tradukseminario kun komuna migrado sur la fama Goethe-migradvojo al Brocken. Gastoj, tradukistoj kaj aktivuloj estas bonvenaj.

Bv. rezervi por vi la naciparkan libertempon de la 13a ĝis la 16a de septembro 2012 ĉe la GEA-filio por klerigado kaj kulturo en Herzberg. Se eblas bv. anonci vian alvenon ĝis fino de aŭgusto 2012.

Peter Zilvar



Medienecho

Unter dieser Rubrik stellt der Beauftragte Hermann Kroppenberg (siehe Esperanto aktuell 2011/6, S. 4) zusammen, wo und wann Esperanto in den Medien erwähnt wurde. Gleichzeitig werden diese Informationen unter www.esperanto.de/mediencho ins Netz gestellt.

25.02.2012

Rhein-Main Extra Tipp: „Esperanto: Eine einzige Sprache für die Menschen in aller Welt“
esperanto.de/medienecho/#rm3

04.03.2012

Kurzer Mitschnitt aus einer Sendung des Berliner Radiosenders B2 mit Lu von Wunsch-Rolshoven
esperanto.de/medienecho/#b23

10.03.2012

„Esperanto für Europa“ mit interessanten Diskussionsbeiträgen:
esperanto.de/medienecho/#dd3

15.03.2012

Neues aus der Esperantogruppe Hameln
esperanto.de/medienecho/dw3

03.04.2012

Europe-online-magazine über den Vorschlag der Eüropa Esperanto-Unio, einen Esperantotext zur Melodie der Europahymne zu singen.
esperanto.de/medienecho/#eo3

03.04.2012

Das „Tageblatt.lu“ zum selben Thema.
esperanto.de/medienecho/#tl3

03.04.2012

Teilnehmer der internationalen Frühlingswoche (siehe Seite 7) besuchen die Schlossstadt Bensberg
esperanto.de/medienecho/#sb3
Dazu gibt es eine kleine Bildergalerie - mit einem Dankeschön an Frau Niekammer und "Bensberg im Blick"
esperanto.de/medienecho/#bb3

13.04.2012

Aus "Le Monde diplomatique" über das ehemalige Neutral-Moresnet, genannt "Amikejo":
esperanto.de/medienecho/#md3

17.04.2012

Europahymne auf Esperanto, diesmal in den Potsdamer Neuesten Nachrichten:
esperanto.de/medienecho/#pn3

18.04.2012

Kalenderblatt der Deutschen Welle: Bericht über die erste Konferenz zum Thema Esperanto vor 100 Jahren.
esperanto.de/medienecho/dw3

20.04.2012

intv – Fernsehen für die Region: 40 Jahre Esperanto-Klub in Pfaffenhofen (Video)
esperanto.de/medienecho/#in3

23.04.2012

Südkurier: Konstanz - Feier zum Geburtstag der Sprache Esperanto
esperanto.de/medienecho/#sk2

28.04.2012

Südkurier: Esperanto verbindet viele Nationen. Auf einen Tee mit Irmtraud Bengsch
esperanto.de/medienecho/#sk3

03.05.2012

Pressemeldung des Landes Baden Württemberg: Stiftung von Büchern in Cervia (siehe S. 23)
esperanto.de/medienecho/#bw3

03.05.2012

The Intelligence: Eine Sprache wird 125 Jahre alt
esperanto.de/medienecho/#ti3

Zur Beachtung: Für den Inhalt und die Qualität hier aufgeführter Quellen erklären sich weder die Redaktion noch der Beauftragte verantwortlich.

Um dem Leser das Abtippen komplizierter Verweise zu ersparen, gibt es hier nur Kurzadressen auf die entsprechenden Netzseiten. Mit einem weiteren Klick ist man dann bei der gewünschten Quelle (solange diese existiert).

Hinweise auf hier nicht genannte Quellen bitte an medienecho@esperanto.de

Germana Esperanto-Asocio ricevis danke jenajn revuojn:



Bulgara Esperantisto (2012/2), *Espero Katolika* (2012/1-3), *FEN-X* (2012/3), *IPR* (2012/1), *La Espero* (2012/2), *La Informilo* (157, 2012 mar), *La Lanterno Azia* (2012/1,3,4), *La Ondo de Esperanto* (2012/4,5), *le monde de l'Esperanto* (581, 2012 maj), *L'esperanto* (2012/1,2), *Norvega Esperantisto* (2012/2), *Novaĵoj Tamtamas* (270, 271), *revuo Esperanto* (2012/4,5), *Sennaciulo* (2012/3+4), *SES informas* (2012/1), *Usona Esperantisto* (2012/2,3).

Retaj sukcesoj de Esperanto

Esperantic Studies Foundation (ESF) investas en la retaj sukcesoj de Esperanto



Esperantic Studies
FOUNDATION

Kiam, antaŭ pli ol jardeko, ĝi entreprenis la unuajn paŝojn por krei la retejojn *edukado.net* kaj *lernu.net*, la fondaĵo ESF nur malprecize antaŭvidis la eksplodan disvolviĝon de la „socia” reto tutmonde. Nuntempe komencas vidiĝi la fruktoj de tiuj fruaj vizioj.

Google aldonis Esperanton al sia tradukejo

Intertempe, la reta revolucio kontribuis al ĝenerala plifortigo de la pozicio de Esperanto inter la lingvoj de la mondo. Tion plej laste signalis la aldono de Esperanto kiel 64-a lingvo uzata de la Google-tradukejo. En tiu atingo, kiel en pluraj aliaj, la agado de ESF rolis signife. Per longdaŭra investado en la laboro de talentaj volontuloj kaj profesiuloj, la fondaĵo helpas peli la retan agadon per Esperanto al novaj amplekso kaj kvalito.

Lernu.net, Vikipedio kaj WikiTrans

El ĉiuj ret-komunumaj projektoj ĝis nun, du aparte elstaras kaj havas grandegan potencialon: Lernu (kun ĉ. 115 mil registritaj uzantoj) kaj Vikipedio (kun pli ol 160 mil artikoloj). ESF nuntempe financas grandskalan renovigon kaj ampleksigon de Lernu, cele al ĝia modernigo kaj transformado al multflanka komunumo de Esperanto-uzantoj. Flanke de Vikipedio, ESF subvenciis la sistemon WikiTrans (kreitan de lingvisto Eckhard Bick, Danio), kiu kapablas provizi krudan Esperantan tradukon de la tuta anglalingva Vikipedio en deko da tagoj. Post la necesa homa redaktado, tiuj tekstoj povas enorme riĉigi kaj altigi la pozicion de Esperanto

en Vikipedio, kie ĝi jam troviĝas en la dua rango de lingvoj – tiuj kun pli ol 100 mil artikoloj.

Google ne publikigis detalojn pri la paralela tekstaro, kiun ĝi uzis kiel bazon de la Esperanto-modulo en sia tradukejo. Tamen estus mirinde, se ĝi ne utiligus interalie la ampleksajn paralelajn tekstojn kreitajn kadre de tiuj du grandaj retaj projektoj.

Faktoj kaj nombroj ...

La ĉi-suba kolekto de interesaj faktoj pri Lernu kaj WikiTrans montras la kreskantan gravecon de la reta agado de ESF, al kiu povas kontribui ĉiu kunlaboremulo – ekzemple per verkado, reviziado aŭ traduko de artikoloj por Vikipedio (eventuale uzante WikiTrans kiel bazon), per aliĝo al ŝatantoj de Lernu en Facebook – www.facebook.com/lernu.net, per socia informado, volontulado aŭ per donaco al la kampanjo „100.000 EŬR por ESF“, lanĉitan de Lernu kaj E@I: <http://kampanjo.ikso.net>.

Pri Lernu (lernu.net)

- ✓ pli ol 218 milionoj da vizititaj paĝoj ekde 2004
- ✓ ĉ. 115 mil registritaj uzantoj de Lernu loĝantaj en 218 landoj kaj teritorioj
- ✓ pli ol mil ŝatoj en unu tago post dissendo de la invita mesaĝo al Lernu-komunumo aliĝi al la oficiala Facebook-paĝo. Kun nun ĉ. 4 mil ŝatantoj, Lernu jam atingas

pli ol unu milionon da homoj (t.e. amikoj de ŝatantoj)

✓ Usono estas la lando kun la plej granda nombro de vizitoj (pli ol miliono ekde 2005) kaj de registritaj uzantoj (pli ol 15 mil)

✓ Brazilo estas en la dua loko post Usono kaj laŭ la kvanto de vizitoj (ĉ. 800 mil ekde 2005) kaj registritaj uzantoj (pli ol 10 mil)

✓ Sur la tria, kvara kaj kvina lokoj laŭ la kvanto de vizitoj estas Francio, Germanio kaj Pollando, dum tiujn lokojn tenas Hungario, Ĉinio kaj Germanio laŭ la nombro de registritaj uzantoj.

✓ Ĉinio kaj Sud-Ameriko (pli signife, Kolombio) montras signojn de tre bona kresko (en kelkaj regionoj, pli ol 100% en la lastaj tri monatoj kompare kun la sama tempo pasintjare)

Pri Vikipedio kaj WikiTrans

WikiTrans (eo.wikipedia.org/wiki/wikitrans):

✓ WikiTrans uzas ĉ. unu gigabajton da vortoj en sia datumbazo

✓ Jam en aŭgusto 2010 WikiTrans disponigis en la reto 1,5 milionojn da artikoloj el Vikipedio. Pli ol 3 milionoj da artikoloj de la anglalingva Vikipedio povus esti tradukitaj ene de 10 tagoj (t.e. ĉ. 17 mil artikoloj tage)

✓ WikiTrans regule retradukas artikolojn por kapti la ŝanĝojn kaj modifojn por esti daŭre aktuala

✓ Kiam vi serĉas artikolon, por kiu ekzistas anglalingva artikolo, sed ankoraŭ ne Esperanta, vi povas iri al la paĝo, tradukita de WikiTrans.

(laŭ novaĵservo de *esperantic.org*)

Festliche Einweihung des Becker-Meisberger-Instituts im saarländischen Blieskastel

Das Städtchen Blieskastel im Kreis Saarpfalz ist vielen älteren Esperantisten noch als Wohnort von Günter Becker (1930-2008) und seiner Frau Maria Becker-Meisberger (1925-1999) bekannt. Günter Becker war von 1956 bis 1964 Vorsitzender der Esperanto-Weltjugend (TEJO) und von 1964 bis 1974 Generalsekretär des Esperanto-Weltbundes (UEA). Das Wohnhaus der beiden war in der Stadt Blieskastel bekannt als „das Ohr zur Welt“. Ist doch bis zum heutigen Tag die riesige Parabolantenne auf dem Dach von weitem sichtbar.

Noch vor seinem Tode verfügte Günter Becker, aus seinem Wohnhaus ein Institut zur Förderung interkultureller Kommunikation und der Esperanto-Bewegung zu machen. Nach einem Umbau in Eigenregie lud der Saarländische Esperanto-Bund (SEB) nun Esperanto-Freunde aus dem Saarland und Rheinland-Pfalz für Samstag, den 5. Mai 2012, zu einer feierlichen Eröffnung ein. Das Haus soll fortan unter dem Namen „Zentrum für Kommunikation, Dokumentation und Erforschung der Internationalen Sprache Esperanto / Becker-Meisberger-Institut“ arbeiten.

Der Einladung folgten etwa 30 Esperanto-Freunde, die mehrheitlich Maria und Günter Becker noch persönlich gekannt hatten. Annelie Faber-Wegener, die Bürgermeisterin der Stadt Blieskastel, begrüßte zusammen mit Oliver Walz, Vorsitzender des SEB und Geschäftsführer des neuen Institutes, die Anwesenden. Für die Bürgermeisterin fügt sich die internationale Ausrichtung des neuen Instituts vorzüglich in den politischen Rahmen der Stadt mit ihren vielen Partnerschaften ein. Walz machte deutlich, dass der SEB keine geeignetere Stadt für sein Institut hätte finden können als die Stadt im Bliesgau. Wolfgang Bohr, Vorsitzender des Esperanto-Landesverbandes Rheinland-Pfalz, überbrachte die Grüße der Nachbarn sowie die des Deutschen Esperanto-Bundes. Er drückte die Hoffnung aus, das neue Institut werde sich

zu einem vielbesuchten Zentrum für die Internationale Sprache im Saar-Lor-Lux-Raum entwickeln und der internationalen Esperanto-Bewegung in diesem Raum und darüber hinaus neue Impulse geben.

Anschließend erläuterte Oliver Walz die geplanten Aufgaben des Hauses. Das Institut soll zunächst Geschäftsstelle des SEB sein. Im neu geschaffenen großen Tagungsraum des Institutes können Fachtagungen, Schulungen, Ausstellungen und kleinere Konferenzen zum Thema Esperanto und internationale Verständigung stattfinden. Die umfangreiche Fachbibliothek sowie ein Audio- und Video-Archiv machten das Institut attraktiv für Doktoranten aus der ganzen Welt, ist Oliver Walz überzeugt. Zurzeit werden einige Gästezimmer für Studienaufenthalte eingerichtet.

Nach Walz referierten Edgar W. Müller und Josef Dörr über das Thema „Esperanto und Interlinguistik heute“. Professor Markus A. Groß sprach zum Thema „Weltsprachen in der Geschichte der Menschheit“. Der Höhepunkt der Eröffnungsfeier war jedoch die Festansprache von Prof. Dr. Reinhard Selten. Unter dem Titel „Mein Leben mit und für Esperanto“ erzählte er, wie er zu Esperanto gekommen ist und wie ihn die Idee bis heute fasziniert. Danach ehrte Oliver Walz Prof. Dr. Selten, indem er diesen zum Ehrenmitglied ernannte.

Wolfgang Bohr

Bürgermeisterin Annelie Faber-Wegener und Oliver Walz



**„Das Ohr zur Welt“ auf dem Becker-Meisberger-Institut.
Fotos: Ilona Schmidt-Bohr**



La Bonn-a deklaro nun dokumento de la Ĝenerala Asembleo de UN

La fina deklaro de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj, kiun la Departemento pri Publika Informado de Unuiĝintaj Nacioj (UN) okazigis en Bonn en septembro pasintjare, fariĝis oficiala dokumento de la Ĝenerala Asembleo de UN. Ĝi estis tradukita al ĉiuj oficialaj lingvoj de UN kaj en la 20-a de marto registrita en la aktoj de la Ĝenerala Asembleo.

La fina deklaro estas aparte celita por la UN-konferenco pri daŭripova evoluo, Rio+20, kiu okazos en Rio-de-Ĵaneiro de la 20-a ĝis la 22-a de junio. La deklaro enhavas multajn rekomendojn, kiuj estu konsiderataj tie. En la Bonn-a konferenco la reprezentantoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) sukcesis akceptigi plurajn erojn en la fina deklaro, kies unua versio diris nenion pri la lingva dimensio de daŭripova evoluo. Eĉ la nura vorto "lingvo" ne estis menciita en la unua versio, sed danke al la delegitaro de UEA la graveco de lingvoj kaj lingva diverseco estas menciita plurfoje en la fina versio. Fundamente gravaj estas ĝia konstato, ke "biodiverseco kaj lingva diverseco estas nedisigeblaj, konektitaj kaj interdependaj", kaj la sekva alineo:

"Ni alvokas por respekto al kaj inkluzivigo de etnaj lingvoj en la eduka sistemo, ĉar tiaj lingvoj entenas la kompleksecon de siaj respektivaj medioj, kaj ankaŭ por konsidero de la potencialo de neŭtrala internacia lingvo kombinanta klarecon kaj facilecon de lernado kun sia neŭtraleco, kaj tiel povanta esti rigardata kiel esence daŭripova."

El: Gazetaraj Komunikoj de UEA

Mallonge

Englisch außer Mode

"Ich werde heute in meiner Muttersprache sprechen, da Englisch außer Mode gekommen ist", sagte Guy Verhofstadt, der Fraktionschef der Liberalen im Europaparlament in Straßburg. Und sprach Flämisches.

Quelle: Die Welt vom 13.12.2011

<http://www.welt.de/politik/ausland/article13765674/Die-englische-Sprache-ist-ausser-Mode-gekommen.html>

Senkosta maklerejo por Esperantistoj

La retejo per.esocom.de povus helpi al germanaj Esperantistoj, akiri kontakton al eksterlandaj samideanoj. Trovu per Esperanto homojn kun komunaj aŭ reciprokaj intereso en via regiono, via lando kaj la tuta mondo!

Frank Merla

Peter Zilvar Mandatsträger

Der Filialleiter des Deutschen Esperanto-Bundes für Weiterbildung und Kultur, Peter Zilvar aus Herzberg wurde von den Stadtratsverordneten als Vertreter für die Bürger und Esperanto in den städtischen Ausschuss für Kultur und Tourismus gewählt. Damit soll ein kompetenter Repräsentant für Esperanto in Sachen Esperanto-Stadt in kulturellen Belangen Mitspracherechte haben.

Stumme Rettung

Österreichische Bergretter haben es oft schwer, allein schon wegen der Sprachbarriere. Das ist aber jetzt vorbei, denn jetzt gibt es „Sprachkarten“. Sie enthalten benötigte Sätze in der jeweiligen Muttersprache. Der Bergretter hält beispielsweise Karte 24 auf Deutsch hoch. Der Verunglückte sucht in seinen Sprachkarten nach der gleichen Nummer, liest die Übersetzung und sucht dann eine Sprachkarte mit der Antwort.

Quelle: <http://www.kleinezeitung.at/freizeit/aktivwellness/winter/2918141/bergretter-verwenden-sprachkarten-uebersetzungshilfe.story>

Gefunden von Walter Klag

Esperanto - edzperanto

Ĉu vi serĉas kunul(in)on? Provu ĉe edzperanto.org. 82 viroj kaj 13 virinoj atendis fine de majo 2012 kontaktprovon.

(voko)

Hotelo en St. Petersburgo

Se vi planas vojaĝi al St. Petersburgo, First Hotel en la retejo La Vojaĝo estas je via dispono en Esperanto.

<http://vojagxo.info/2011/03/12/first-hostel-st-petersburg-rusio/>

Utilaj retpaĝoj en Esperanto

Per la adreso <http://www.scoop.it/t/esperanto-lingvo-de-la-mondo> vi trovas paĝon, kiu referencas al multaj retpaĝoj en la tuta mondo, utilaj por Esperantistoj.

(voko)

Esperanto kaj la fondo de la internacia organizo WCA por Vikipedio-verkantoj

„Wikimedia Österreich“ (asocio de aŭstrijaj Vikipedio-verkantoj) fondis kun multaj aliaj Vikipedianoj (Germanio, Svislando, Ĉilio,...) la organizon Wikimedia Chapters Association (WCA). Oficiala decido de la fond-renkontiĝo estis: „Surbaze de la multlingveco de nia movado la komitato publikigos siajn decidojn en Esperanto por subteni la tradukadon al aliaj lingvoj“.

(http://meta.wikimedia.org/wiki/Wikimedia_Chapters_Association/Establishment_of_the_Chapter_Council_Steering_Committee/eo),
Yahoo-grupo aŭstraj esperantistoj

UEA en konsulta partnereco kun Unesko

Universala Esperanto-Asocio fariĝis konsulta partnero de Unesko, la Organizo de UN por Edukado, Scienco kaj Kulturo. Tiel decidis la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ino Irina Bokova, konforme al la novaj gvidlinioj pri la rilatoj de Unesko kun Ne-Registaraj Organizaĵoj (NRO-j), kiujn la Ĝenerala Konferenco adoptis en Novembro. Fakte, laŭ la novaj gvidlinioj ne plu temas pri rilatoj sed pri partnereco por pli bone esprimi, ke Unesko celas kunlabori kun NRO-j por la komunaj celoj kaj ne nur formale rilati kun ili. Por Unesko NRO-j estas gravaj, ĉar pere de ili ĝi rekte atingas la civilan socion preter la ŝtataj strukturoj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Internacia Virina Tago 2012 en Hiroŝimo

Taeko Osioka de la Hirosima Esperanto-Centro raportas, ke la plenuma komitato de la Internacia Virina Tago 2012 en Hiroŝimo ricevis 235 mesaĝojn el 65 landoj kaj teritorioj. Ekzemple el Francio 50, el Germanio 13 kaj el Aŭstrio 3. Oni ekspoziciis la mesaĝojn ĉe 3 urbaj kunvenejoj dum 3 semajnoj.

osioka@mua.biglobe.ne.jp

Esperanto-radio por Androidaj telefonoj

Pli kaj pli da homoj uzas la plurfunkciajn telefonojn kaj tabulkomputilojn, funkciajn per la operacia sistemo Android. Aperis senpaga aplikaĵo „Esperanto-radio Muzaiko“ por Androidaj aparatoj, kiu ebligas aŭskultadon de pli ol 10 Esperantaj radio-kanaloj. Memkompreneble ankaŭ aŭdeblas la tuttempa Muzaiko, kiu festis sian unujariĝon en Aprilo kun specialaj programeroj. La radioaplikado multe simpligas la aŭskultadon de radioelsendoj: la telefono estas ĉiam ĉemane kaj sufiĉas nur premo de butono por ekaŭskulti radion. La programo estas senpage elŝutebla el la Androida Bazar. Serĉu la vorton: „Muzaiko“, retumu al <https://market.android.com/details?id=dk.nordfalk.esperanto.radio>.

Du novaj senpagaj e-libroj de Tolstoj

En la kolekto de elektronikaj libroj (e-libroj) de Sezoj aperis du faksimilaj libroj de Lev Tolstoj, eldonitaj antaŭ 100 jaroj, nome en 1912 kadre de la serio Tutmonda Biblioteko je la memoro de L. Tolstoj. Ambaŭ libroj estas senpage elŝuteblaj en la retejo:

<http://esperanto.org/Ondo/Libroj/Libro.php>, en kiu nun estas 13 senpagaj e-libroj kaj unu aĉetebla e-libro.

La Ondo

UEA retenis la membronombro

Laŭ la oficiala statistiko, aperinta en la Aprila numero de la revuo *Esperanto*, en 2011 Universala Esperanto-Asocio (UEA) havis 5321 individuajn membrojn en 118 landoj, t.e. je 33 pli ol en 2010. La pinto de 12 landoj konsistis ekz. el Francio (534; -13), Germanio (502; -4); Brazilo (385; +11) kaj Rusio (144; +56). Iom malkreskis la nombro de aligitaj membroj, t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estas samtempe individuaj membroj de UEA. Ili nombris 10 480 (-47). Sur la unua loko estis Ĉinio

kun 1051. Por pli ol 300 aligitaj membroj pagis ekzemple Japanio (908; +7), Pollando (750; +50), Germanio (653; -18), Kroatio (398; +139) kaj Usono (386; -102). La tuta UEA-membraro, kiu konsistas el la individuaj kaj aligitaj membroj kune, estis pasintjare 15801 (-14). Malpli ol 30-jaraj estis 373 individuaj membroj, kiuj do samtempe estis individuaj membroj de la junulara sekcio TEJO (+49). Krome, 1714 el la aligitaj membroj estis malpli ol 30-jaraj (-20), tiel ke TEJO havis entute 2087 membrojn (+29).

Gazetaraj Komunikoj de UEA


35-a Esperantologia konferenco en Hanojo

Esperantologia Konferenco estas jam tradicia programero de la Universala Kongreso de Esperanto. Ĝin organizas la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) kaj ĝi okazis unuafoje en Varno en 1978. La 35-an sesion en Hanojo en Aŭgusto gvidos prof. Kiselman kun Mélanie Maradan. La programo antaŭvidas kvin prelegojn. La prelegoj estos poste publikigitaj kiel aktoj ĉe la Libroservo de UEA. Aktoj de pluraj antaŭaj Esperantologiaj Konferencoj estas ankoraŭ haveblaj.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

PIV aperis en la reto

En 2010 komenciĝis monokolekta kampanjo por enretigo de *Plena Ilustrita*



Vortaro de Esperanto. La eldoninto de la vortaro Sennacieca Asocio Tutmonda kaj la organizaĵo E@I interkonsentis pri la projekto, kiu donu al ĉiuj dezirantoj senpagan retan aliron al la tuta enhavo de la vortaro, kaj samtempe ebligis retan administradon de la datumaro. Post plurjara laboro aperis nun la reta versio de la fama vortaro. Necesas nur registriĝi, la servo mem estas senpaga.

www.vortaro.net

Rilate al la Google-tradukilo FBI atentigas pri Esperanto

Februare aperis en la oficiala blogo de la servo Google-tradukilo novaĵo pri tio, ke ekde nun oni povas per ĝi traduki ankaŭ al aŭ de Esperanto. Malgraŭ tio, ke por Esperanto la maŝino ne havis multe da trejnmaterialo kaj la tradukado okazas pere de la angla, la kvalito de la Esperantaj tradukoj estas laŭ Google superaveraĝa kaj oni povas supozi, ke en la estonteco ĝi ankoraŭ pliboniĝos, ĉar la uzantoj povas korekti erarojn kaj tiel kontribui per pli bonaj tradukoj. Eĉ FBI-retpaĝaro uzas Esperanto-lingvan frazon por atentigi pri la nova ebleco uzi Google-tradukilon en sia retejo: „As Esperanto speakers might say, estas malgranda mondo finfine...it's a small world after all.“

http://www.fbi.gov/news/news_blog/translation_040512

Unuaj eĥoj pri la popol-iniciato rilate Eŭropan Himnon

Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) lanĉis „civitanan proponon“, kio eblas ekde la 1a de Aprilo, nome kanti la Eŭropan himnon en Esperanto. Kiel konate, ne ekzistas teksto por la himno, nur melodio. Umberto Broccatelli kreis tekston en Esperanto (<http://ec.europa.eu>). Gazetara komunikado legeblas interalie de GEA (www.esperanto.de/presse/aktuelles/index.html). Venis nun unuaj eĥoj en la gazetaro, ekzemple: www.europeonline-magazine.eu/erste-eu-buergerinitiative-europa-hymne-auf-esperanto_202704.html

La unua intervjuo de la nova prezidanto de la plenumkomitato de SAT

La 17an de marto la 29-jara natursciencisto Vinko Markovo el Tübingen estis elektita kiel prezidanto de la plenumkomitato de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), la tutmonda, neneŭtrala kaj sendependa organizo de laboristaj esperantistoj. Li respondis kelkajn demandojn de *La Ondo de Esperanto*. La teksto de la intervjuo, aperinta en la Maja kajero de *La Ondo de Esperanto*, estas ankaŭ legebla en la reto

<http://sezonoj.ru/2012/04/kamarado-prezidanto-respondas/>

Ĝemelurba agado de UEA 10-jariĝis

Kontaktoj inter ĝemelaj urboj, precipe inter la Esperanto-klubo kaj individuaj Esperantistoj, okazas jam de tre longe, sed en 2002 Universala Esperanto-Asocio elektis komisiiton por kunordigi la agadon kaj prizorgi informfluan kaj spertinterŝanĝon en tiu kampo. Tiun taskon akceptis la ĉina aktivulo Wu Guojiang. En la 40-a numero de Informilo pri Ĝemelaj Urboj troviĝas multaj gratulmesaĝoj kaj rememoroj el la tuta mondo, kun informoj kaj ekzemploj pri la farita laboro. La tuta kolekto de la informilo estas elŝutebla en interreto, kie eblas facile serĉi menciojn pri unuopaj urboj, personoj ktp.

Gazetaraj Komunikoj de UEA, www.uea.org

Pli ol 500 Esperanto-lernantoj en Sicilio

Bone disvolviĝas la projekto pri establo de la Internacia Centro de Interkulturo en Mediteraneo en Sicilia urbo Mazara del Vallo (Mazaradelvalo). Ekde januaro 2012 Esperanto estas instruata en deko da lernejoj, du liceoj (scienca kaj arta), al instruistaro de la urbo kaj al oficistoj de la urbodomo. Pli ol 500 personoj lernas nun la internacian lingvon en la urbeto.

<http://sezonoj.ru/2012/05/21sicilio/>



Historio, nuno kaj estonto en la Aprila Malferma Tago

D-ro Ulrich Lins estis la ĉefa preleganto en la 36-a Malferma Tago de la Centra Oficejo (CO) de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Aprilo. La aranĝo allogis 85 vizitantojn kaj okazis precize 50 jarojn post la translokiĝo de la oficejo al la domo ĉe Nieuwe Binnenweg. D-ro Lins prelegis dufoje pri personoj, kiujn li renkontis dum siaj vizitoj, kaj pri movadaj eventoj, ligitaj al la CO. La prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, Seán O'Riain, parolis pri la civitana iniciato por la kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto. Flory Witdoeck vivigis la prelegon kantante la himnon kun la vortoj de Umberto Broccatelli. Lige kun la kunsido de la Estraro de UEA ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). La sekva Malferma Tago estos Sabaton, la 24-an de Novembro 2012.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

Novaj Komitatanoj B de TEJO

Paweł Fischer-Kotowski el Pollando, Wang Shanshan el Ĉinio, Ronald Baby González el Kubo/Hispanio kaj Magnus Henoch el Svedio/Britio estas novaj Komitatanoj B de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ili estis elektitaj per balotado de Individuaj Membroj de TEJO okazinta Marte kaj Aprile, kaj oficos de Junio 2012 ĝis Majo 2014. La komitatanoj reprezentas la individuajn membrojn de TEJO

www.tejo.org/eo/node/1443

Kolektis kaj prilaboris Uwe Stecher

Kiam mi legis medicinajn gazetojn, mi havis la ideon, traduki kelkajn artikolojn, kiuj povus esti interesaj por multaj homoj (esperantistoj). Temoj povas esti: trodikeco, sango-premo, kardiovaskulaj malsanoj (malsanoj de koro kaj sangocirkulado), ktp. Mi estas doktoro de interna medicino, mi laboris dum 12 jaroj en praktikejo kaj dum la lastaj tri jaroj kiel pensiulo. Pro tio mi havas la tempon, verki fak-artikolojn (espereble) kompreneblajn por ĉiu kiel la suban.

d-ro Arnulf Schrapp



**Jam 15 minutoj
da moviĝo
reduktas la
mortecon**

Regula korpa aktiveco reduktas ne nur la riskon por kardiovaskulaj malsanoj, sed ankaŭ por la ligitaj malsanoj kiel trodikeco, diabeto kaj malsanoj de la artikoj kaj ankaŭ la riskon de karcinomo. La Monda Organizaĵo pri Sano rekomendas semajne minimume 150 minutojn da moviĝo de modera intenseco kiel rapida iro aŭ 75 minutojn da streĉa aktiveco kiel rapida kuro. Sed ĝis nun ne estis klare, ek de kiu minimumo da moviĝo oni povus kalkuli kun vivplilongigaj efikoj.

Tiun sciencan problemon traktis esploristoj el Tajvano en prospektiva kohorta studo kun 416.175 partoprenantoj (48 % estis viroj). Tiuj estis demandataj per normigita proceduro unu fojon jare (1996 – 2008) pri korpa aktiveco, faktoroj de la vivstilo, kiuj estas gravaj por la sano, kaj medicinaj diagnozoj. La korpa aktiveco estis dividita en 5 kategoriojn: malaktiva, facila, modera, alta kaj tre alta. La partoprenantoj aĝis minimume 20 jarojn kaj estis observataj dum 8 jaroj.

Kompare kun la malaktivaj personoj montriĝis statistike signifa efiko sur la riskon de morto jam ek de facila korpa aktiveco de 92 minutoj semajne aŭ 15 minutoj tage: La mortorisko en tiu grupo estis reduktita je 14 % kompare kun malaktivuloj kaj la viv-ekspekto plilongigita je 3 jaroj. Ĉiu kvarona horo da aldona taga aktiveco

reduktis la mortoriskojn je 4 %. La preventiva efiko montriĝis en ĉiuj aĝgrupoj, ĉe ambaŭ seksoj kaj ĉe kardiovaskulaj malsanoj. Inverse partoprenantoj sen menciindaj korpaj aktivecoj havis mortoriskojn plialtigitajn je 17 %.

Resumo

Ek de 15 minutoj da facila korpa aktiveco tage montriĝis statistike signifa redukto de mortorisko. Rilatoj al mortkaŭzoj estis trovitaj ĉe kardiovaskulaj malsanoj, diabeto kaj karcinomoj. La mesaĝo, ke jam unu kvarona horo tage havas pozitivan efikon sur la viv-ekspekton, helpu instigi ne-aktivajn homojn.

Fonto:

Dr. rer. nat. Nicola Siegmund-Schultze, Deutsches Ärzteblatt 2012; 109(7): A-324 / B-281 / C-277

Literaturo:

Wen Ch P, Man Wai J P, Tsai M K, et al.: Minimum amount of physical activity for reduced mortality and extended life expectancy: a prospective cohort study. Lancet 2011; 378: 1244–53.

Nigam A, Juneau M: Survival benefit associated with low-level physical activity. Lancet 2011; 378: 1202–3.



Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen

Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 5: Unregelmäßigkeiten in einer fortlaufenden Zählung ...

... vor allem bei Periodika sind für einen Bibliothekar die Horrorvision ersten Ranges. Das passiert regelmäßig, und fast genauso häufig wird es nicht gleich anschließend ausgebessert oder wenigstens darauf hingewiesen. Es ist fast schon Tradition: man geht einfach davon aus, dass es die Leser hoffentlich nicht stört oder sie es womöglich gar nicht bemerken. Und so kommt es, dass man erst nach Jahren diese Fehler und Folgefehler bemerkt und eine vermutlich korrekte Abfolge rekonstruieren muss. So wurde im vorigen Heft leider irrtümlich „Folge 3“ statt „Folge 4“ angegeben (Red.: die Redaktion bitte um Entschuldigung), daher ist dieses jetzt die Folge 5. Dieser Fall bot nun Anlass, auch mal über diese Art von Widrigkeit zu berichten, die immer wieder den Alltagsbetrieb unserer Zeitschriftenbearbeiter hemmt.



Dr. Jochen Wagner, Schatzmeister von BAVELO, hier im Auftrag des D.E.B., Jürgen Bauer, ehrenamtlicher Mitarbeiter der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen, Pierre Caliarì, Italienische Esperanto-Jugend, Roberto Zoffoli, Bürgermeister von Cervia, Bianca Verri, Bibliotheksdirektor



Michael Steffel, Leiter der Stadtbibliothek Aalen, Utho Maier, Direktor der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen, Wolf-Dietrich Fehrenbacher, Erster Bürgermeister von Aalen, Karl Heinz Schaeffer, Geschäftsführer der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen. Foto: Rathaus Aalen

Gleichzeitig soll bei dieser Gelegenheit kurz auf die Osterwoche zurückgeblückt werden: unsere Büchergabe kam bei der Kommune Cervia sehr gut an und wurde auch in der Bibliothek Maria Goia feierlich inszeniert. Im Gegenzug war man so freundlich, den Aalenern eine Reihe von italienischen Büchern zu schenken. Im Rahmen einer Feierstunde mit Pressekonferenz im Rathaus Aalen wurden diese Bücher an die Aalener Stadtbibliothek weitergegeben, verbunden mit dem Hinweis an die deutsche Presse, dass Völkerverständigung und der Faktor Kultur für uns Esperantisten schon zum Alltag gehören und unsere Sprache diesen Sommer ihren 125. Geburtstag feiert. Die Kommunalpolitiker in Aalen nahmen mit Wohlwollen zur Kenntnis, dass auch die neueste Städtepartnerschaft nicht nur durch „Besuche von Sportvereinen und Offiziellen“ mit Leben erfüllt wurde. Berichte darüber erschienen auf den Internetseiten der Stadt Aalen, des Pressedienstes Baden-Württemberg und in unseren lokalen Tageszeitungen: Aalener Nachrichten sowie Schwäbische Post (statt Fußnoten der Hinweis: genaue Adressen findet der interessierte Leser auf unserer Netzseite „esperanto-aalen.de/presse.htm“).

Kurz noch ein ganz anderes Thema: Am 23.4. war wieder einmal der Welttag des Buches. Gelesen (oder im Radio gehört) hat man darüber kaum etwas. Man könnte also denken, da wäre wohl ein Aufruf „Leute, lest mehr Bücher!“ überfällig. Ich glaube aber, das ist gar nicht so nötig. In Spanien etwa tun das viele: die Spanier lesen jährlich 10,3 Bücher pro Person (im Vorjahr schafften sie nur 9,8). Interessanter ist dabei aber diese Erkenntnis: sie lasen meistens auf Papier – nur 3,9% der Menschen haben ein elektronisches Buch (oder in Englisch ebook). Mein Fazit ist: keine Bibliothek braucht sich vor der Zukunft zu fürchten, schon gar nicht vor einer „elektronischen Konkurrenz“ zu Buch oder Zeitschrift!

Utho Maier

La sorto de „espoteko“

Raporto de Johano Pachter, GEA-arkivisto kaj -bibliotekisto

La fama librokolekto „espoteko“ jam de 2007 ne plu ekzistas, kaj la nomo „espoteko“ estis ĝis nun nur provizore uzata por la kolekto de libroj kaj gazetoj en la verda salono de la Berlina Oficejo (BerO). Tiu estas ja la administra centro de Germana Esperanto-Asocio (GEA), kiun Germana Esperanto-Junularo (GEJ) kaj Esperanto-Ligo Berlin (ELB) per subkontrakto uzadas; ELB ekzemple kunvenas ĉiun ĵaŭdon en la „verda salono“ de BerO.

ELB ne havis kaj ne havas financajn rimedojn por havi ejon por propra biblioteko. Fakte oni planis en la jaro 2001 prizorgi propran ejon, sed la fajro kaj la evoluo poste, ĉefe mankanta helpo de berlinanoj malebligis tion. La kolekton „espoteko“ neniuj volis akcepti, tiel ke ĝi fariĝis senhejma, tial mi decidis enproprigi ĝin al la arkivo de GEA kaj kunigi kun libroj kaj revuoj de la arkivo. Ĉiuj

dokumentoj de GEA kaj GEJ jam per decido de la GEA-kaj GEJ-estaroj en la jaro 1997 eniras la arkivon, kies komisiito ekde la sama jaro mi estas.

La dokumentojn de ELB mi prizorgas ĉefe ekde mia translokiĝo al Berlin en 1994, kunligante ilin kun la dokumentoj, kiuj jam troviĝis en la GEA-arkivo. Tiujn dokumentojn mi intencas donaci al Staatsbibliothek


Führung für Esperantisten durch das Bundesarchiv in Berlin

Wie in *Esperanto aktuell* 1/2012, S. 12, angekündigt, fand am 11. Mai 2012 (15.00-18.00 Uhr) im Bundesarchiv (Niederlassung Berlin-Lichterfelde) eine außerordentlich interessante Führung für Esperantisten statt. Es nahmen 28 Personen teil, darunter 10 Nichtberliner. In Vorbereitung der Führung erhielten alle Teilnehmer Material zu Quellen über Esperanto in den Beständen des Bundesarchivs, einschließlich der Stiftung Archiv der Parteien und Massenorganisationen der DDR.

Die Mitarbeiter des Bundesarchivs Brigitte Fischer, Grit Ulrich und Hans-Jürgen Voß gaben beim Rundgang auf dem Gelände in Lichterfelde wichtige Erläuterungen. Das Jubiläum „125 Jahre Esperanto“ war Thema einer Ausstellung von

Büchern und Zeitschriften aus der Periode vor 1965 sowie von GDREA (ab 1965). Eine Archivalienausstellung mit Dokumenten zu Esperanto von den Anfängen bis 1990 vermittelte eine Vorstellung davon, was den interessierten Benutzer im Bundesarchiv erwartet. Sowohl die Überwachung der Esperantisten und die Verbote ihrer Verbände als auch die umfangreiche Tätigkeit des Esperantoverbandes in der DDR seit 1965 sind ausführlich dokumentiert. Das Archivgut des Esperantoverbandes der DDR ist vollständig im Bestand DY 27 - Kulturbund der DDR vorhanden. Das Findbuch dazu steht online unter <http://startext.net-build.de:8080/barch/MidosasSEARCH/dy27/index.htm>. Die Bibliothek des Esperanto-Verbandes ist katalogisiert und kann ausgeliehen werden (ca. 2100 Bände sowie Zeitschriften). Das Verzeichnis dazu findet man ebenfalls online unter: http://www.bundesarchiv.de/findbuecher/sapmo/b_esperanto/index.htm.

Außerdem verwahrt die Stiftung persönliche Nachlässe einiger



zu Berlin, laŭ simila kontrakto kiel kun Bayerische Staatsbibliothek München, al kiu iris ĵus la „Bavara parto“ de la GEA-arkivo.

Post likvido de la Esperanto-centro en Falkstraße mi transprenis ankaŭ la tie restantajn dokumentojn, provizore deponinte ilin en mia domo en montaro Harco. Kun tiuj dokumentoj translokiĝis tien ankaŭ la espotekajoj, ĉar neniu pretis akcepti ilin en Berlin. Post vendo de la domo en Harco kaj revenigo de la materialo al Berlin denove neniu pretis akcepti la tuton.

Dankinde pliaj personoj helpis malgrandigi la kolekton de superfluaĵoj, aliaj personoj prenis hejmen valorajn aĵojn, por kiuj ne estis plu loko en la verda salono kaj korta domo. Danke al GEA kaj GEJ la kolekto de libroj kaj parto de gazetkolekto troviĝas en la verda salono de BerO. Tiun kolekton ni ĝis nun nomas „espoteko“, sed fakte ĝi ne plu tiu estas. Tial mi decidis kun Anja Eisemann, la nova bibliotekistino en BerO, nomi la tuton, la verdan salanon

kun la libro- kaj gazetkolekto „Esperanto-Bibliothek Berlin“ aŭ en Esperanto „Esperanto-Bibliothek Berlino“. Tiu nomo estas nacie kaj internacie pli klara ol „espoteko“. Por laboraj kialoj ni plu uzos la nomon „espoteko“, same por la kolekto kiel ankaŭ por la ejo, la verda salono, same kiel ni plu uzas la nomon BerO, kvankam ĝi datas jam el la tempo, kiam ĝi ankoraŭ ne estis la administra centro de GEA.

Pri la jura sorto de la biblioteko oni devus ankoraŭ pripensi. Eblus ĝin fari sendependa filio de la Germana Esperanto-Bibliothek, kaj fakte multaj libroj en la nova espoteko jam devenas el Aalen. La bibliotekon ni faru aktuala, moderna, bel-aspekta, prezentbla kaj nun pro la prizorgo de profesia bibliotekistino ankaŭ tre faka. Ni kunlaboru kun aliaj bibliotekoj nacie kaj internacie pli profunde ol mi tion povis. Spertojn kaj kontaktojn kun multaj bibliotekoj ni jam havas kaj nur plie evoluigu kaj uzu.

Esperantisten (darunter der Tochter des Gründers des Deutschen Arbeiter-Esperanto-Bundes Ino Kolbe aus Leipzig, einiger Arbeiter-Esperantisten, Mitglieder des Zentralvorstandes von GDREA sowie des bekannten Übersetzers Karl Schulze aus Ostberlin). Der gesamte persönliche Nachlass von Wera und Detlev Blanke (insbesondere die umfangreiche wissenschaftliche Sammlung zur Interlinguistik und Esperantologie) wird auf der Grundlage eines am 11.8.2005 geschlossenen Vertrages dem Bundesarchiv übereignet und kann so der Nachwelt für Forschungen zur Verfügung stehen. Interessenten können Material zur Problematik von Detlev Blanke erhalten.

Über diese und andere Aspekte wurden die Besucher am „Ort des Geschehens“, nämlich im Lesesaal der Bibliothek, im Magazin von Archiv und Bibliothek sowie im Lesesaal des Archivs ausführlich informiert. Wie viele Fragen deutlich machten, war das Interesse sehr groß.

Die Benutzung der Unterlagen ist laut Bundesarchivgesetz jedermann gestattet. Lediglich bei den Nachlässen müssen eventuelle vertragliche Bedingung mit den Einbringern berücksichtigt werden. Für die bestandsübergreifende Recherche steht unter www.bundesarchiv.de die Suchmaschine ARGUS zur Verfügung. Vor Ort sind auch die aufgeführten Kollegen jederzeit ansprechbar.

Wer weitere Informationen zum Thema „Esperanto im Bundesarchiv“ erhalten möchte, wende sich an detlev@blanke-info.de.


Detlev Blanke/Grit Ulrich

Kenntnisse der Nachbarsprache

„Wie würden Sie selbst Ihre Kenntnisse der Nachbarsprache einstufen?“ fragte die österreichische Sozialwissenschaftliche Studiengesellschaft in der Umfrageserie „Gelebte Nachbarschaft in der Grenzregion“.

Die Angaben auf der österreichischen Seite weichen gravierend von den Antworten der ungarischen, tschechischen und slowakischen Nachbarn ab. Um diese unbefriedigende Situation zu verbessern, begann die Niederösterreichische Landesregierung bereits im Vorjahr mit tschechischen und slowakischen Sprachoffensiven in Schulen und Kindergärten. Quelle: Österreichische Gesellschaft für Europapolitik, www.oegf.at

Uwe Stecher



Esperanto estonte en la Bavara Ŝtata Biblioteko

Okaze de la ekspozicio pri Volapük kaj Esperanto ekfunkciis oficialaj kontaktoj inter Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj la Bavara Ŝtata Biblioteko (BSB) en Munkeno. La 12an de marto surbaze de skriba kontrakto Johann Pachter transdonis parton de la GEA-arkivo pri Esperanto al BSB. La biblioteko ankaŭ estonte akceptos ĉion pri „Esperanto en Bavarujo“. Kompreneble ili transprenas nur zorge preparitan materialon. Tial oni antaŭe demandu, en kiu formo transdono eblas.

Estis jam multaj diskutoj, kiel savi materialon pri la 100jara historio de GEA. Multegaj dokumentoj dum la jardekoj eniris la rubujon kaj perdiĝis por ĉiam. GEA per siaj modestaj rimedoj de loko kaj kunlaborantoj ne vidis longdaŭran perspektivon en propra arkivo. Laŭdirinde Johann Pachter kiel komisiito de GEA jam delonge kolektis ĉion, sed ankaŭ en la oficejo en Berlin la loko estas tre limigita kaj, kion montris brulo antaŭ kelkaj jaroj, ne sufiĉe sekura. Des pli GEA ĝojis, ke pere de d-ro Detlev Blanke la Germana Ŝtata Arkivo montris intereson, komence tamen nur pri ĉiu materialo de GDREA. Gravas, ke la arkivaĵoj estas filmitaj, indeksitaj kaj tiel ankaŭ en la reto estas troveblaj por ajnaj esploroj. Tion nur ŝtata aŭ federaci-landa institucio povas garantii.

Nu, en Munkeno ĉio iris glate, ĉar en la kestoj, kiujn transdonis Pachter, ne estis bananoj, kion oni povus kredi rigardante la bildon, sed valoraj aktuoj. D-ino Andrea Pia Kölbl (meze sur la bildo) ĝoje akceptis ĉion. Ekzemplero de „Maks kaj Morits“ surprizis ŝin pro la profesia kvalito, kiel ŝi komentis. Subskribis la kontrakton flanke de la biblioteko

s-ino Susanne Seemann, respondeca pri akcepto de bibliotekaĵoj. La materialo restos posedaĵo de GEA.

D-ino Kölbl estas la projekt- gvidantino en la biblioteko pri la planlingva projekto, kiu konsistas el du subprojektoj. La unua estas granda ekspozicio okaze de la 100a datreveno de la morto de Johann Martin Schleyer, la kreinto de Volapük, kaj la jubileo „125 jarojn Esperanto“. La dua estas

simpozio je 2012-06-15 en BSB pri planlingvaj projektoj, ĉefe pri Esperanto.

Malgranda parto de la donaco jam estas aldonita al la jam preparita, supre menciita ekspozicio. La aktuoj mem estas nun en sekura loko, kie ne plu minacas ilin akvo, fajro aŭ iu alia danĝero. Paŝon post paŝo la materialo estos disponebla en elektronika formo en la BSB kaj, pro kunlaboro kun la Ŝtata Biblioteko de Berlino, estonte ankaŭ tie.

Sur la foto videblas reklamilo pri la kuranta ekspozicio, kaj tie baldaŭ pendos dum pliaj monatoj la afiŝo pri la „Esperanto-Volapük-ekspozicio“, senpaga reklamo por Esperanto.

laŭ raporto de Johann Pachter

Foto: Irina Gerasimova



La nova estraro de Germana Esperanto-Junularo



Alexander Kozak, Sophia Berlin, Alina Labitzke, Clemens Fries, Miriam Hufenbach, Liesa Marie Alfier kaj Carl Bauer

Hallo, Freunde der Sonne!

Der Sommer kommt nun endlich doch noch, und somit rücken auch die Sommertreffen immer näher. Sicherlich werdet ihr euch schon für das eine oder andere Treffen angemeldet haben (wenn nicht sogar für mehrere), denn was ist schon ein Sommer ohne Esperanto! Da Geld leider nicht an Bäumen wächst, haben wir euch mal zusammengestellt, was für Subventionen ihr wo absahnen könnt. Für all diejenigen, denen immer noch nicht die richtige Idee gekommen ist, haben wir noch einen weiteren Vorschlag für den Sommer: Warum nicht einfach mal zu dem idyllischen Esperanto-Schloss in Gresillion / Frankreich fahren?

Was gibt's sonst Neues? Das neue Logo der Deutschen Esperanto-Jugend natürlich. Nach der knappen und spannenden Abstimmung sind wir stolz, das Ergebnis in dieser Ausgabe präsentieren zu können.

Des Weiteren kriegt ihr zu lesen, womit sich unser Vorstand in seinen kreativ-produktiven Sitzungen so die Zeit vertreibt.

Und dann ab an den See und genießt die Sonne!

Miriam & Caroline



Bericht über die Vorstandssitzung: Deutsche Esperanto-Jugend oder wie im Frühjahr 2012 alles anders wurde

Tatort Heidelberg/Nähe Tiergarten: Anfang Mai kamen 7 verdächtige DEJ-Vorstandsmitglieder zusammen, um über Neuerung, Arbeitsverteilung und Umstrukturierung zu debattieren. Das Brisante daran: Mit einem neuen Präsidenten (namentlich: Carl Bauer) an der Spitze und vielen neuen Aktiven an Bord wurde diese Vorstandssitzung als erfolgreich und sehr kreativ empfunden.

Unter Schokoladen-, Backwaren- und Knabbe-reieneinfluss wurden Ideen zutage gefördert, haarsträubende Themen, die fast schon konspirativen Charakter hatten, diskutiert. Nach 7 Stunden waren das nächste Silvestertreffen (JES in Naumburg), die Vernetzung mit anderen Esperantovereinen, die Mittelnutzung oder die zukünftigen Esperanto-Anfängerkurse abgehandelt. Was blieb, war ein gutes „Nach-getaner-Arbeit-Samstag-Feierabend-Gefühl“ und die Gewissheit, dass man gemeinsam etwas bewegen kann.

Zukünftig sollen die Mitglieder der DEJ mehr in unseren Verein einbezogen werden, sich untereinander kennenlernen und stärker davon profitieren, dass sie in einem überregionalen Verbund organisiert sind. Deswegen soll nicht alles Geld nur esperantospezifischen Angelegenheiten zugute kommen, sondern auch ein Kontingent für Jugendarbeit in unserem Verein eingeplant werden. Damit Interessierte umfassender Bescheid wissen, soll auch die neue Homepage zeitnah nutzbar sein.

Außerdem wird es wieder ein „Aktivula Renkontiĝo“ geben, ergo eine Plattform für die Aktiven der DEJ.

Zusammenfassend war es ein äußerst produktives und schönes Wochenende, das hoffentlich alsbald seine Früchte tragen wird.

Und wem dieser Artikel jetzt zu lax geschrieben war, dem wird gerne auf Anfrage das ausführliche Protokoll unserer Vorstandssitzung zugeschickt! Eine Email an kune@esperanto.de, und ihr wisst über alles genauestens Bescheid.



Logowettbewerb - Wir haben einen Gewinner!

Nach einer nerven-
aufreibenden und
tatsächlich ziemlich



knapp ausfallenden Abstimmung bei facebook und per Email gab es doch einen führenden Logoentwurf, der bereits vom Vorstand bestätigt wurde und folgendermaßen aussieht: Noch handelt es sich hierbei um einen ersten Entwurf, der noch verbessert werden kann (etwa, indem nur eine Schriftart verwendet wird), doch dieses Design wird die Grundlage des zukünftigen Logos der DEJ darstellen. Wer freut sich mit uns? :-)

Fahrtkostenzuschüsse für die diesjährigen Sommertreffen

Auch dieses Jahr wird die DEJ wieder versuchen, all ihren Mitgliedern die Teilnahme am sommerlichen Esperantospaß zu ermöglichen, indem sie einen Teil der Fahrtkosten übernimmt. Welche Treffen einen solchen Fahrtkostenzuschuss haben und um wie viel es sich dabei jeweils handelt, könnt ihr der Liste unten entnehmen. Die Voraussetzungen für die Inanspruchnahme, das Abrechnungsformblatt sowie das weitere Procedere sind auf der Internetseite der DEJ zu finden, namentlich unter <http://www.esperanto.de/dej/aktivuloj/subvencioj.php>

Auf einen schönen Sommer in Esperantujo!

Somera Esperanto- kunveno - Japan/Tokio

- 13.07. - 16.07.2012 350€

SES - Slowakei/Nitra

- 21.07. - 29.07.2012 130€

IJS - Ungarn/Nótiacs

- 30.07. - 05.08.2012 130€

UK - Vietnam/Hanoi

- 28.07. - 04.08.2012 350€

(bei Teilnahme von UK

und IJK nur der Zuschuss
für 1 Treffen möglich)

IJK - Vietnam/Hanoi

- 05.08. - 12.08.2012 350€

(bei Teilnahme von UK

und IJK nur der Zuschuss
für 1 Treffen möglich)

FESTO - Frankreich/ Metabief

- 17.08. - 24.08.2012 100€

Trovitaĵo

Ĉiam
havu
la vivon
ĉe vi!
Kun
tiu
j tre
belaj
poŝoj
sen-
dube.



Ĉu karulino?
Ne prokrastu la
manĝadon, mi
eble malfruos
hodiaŭ!

Ne, tute
ne rilatas al
mia sekret-
ariino ...

© mil, <http://mycartoons.de/>

Tradukado de <http://bildetejo.net/>

Famaj kantoj por ludi mem (aŭ almenaŭ kunkanti ĝuste)

Ĉu vi dum Esperanto-aranĝo ne ankaŭ havis iam tiun momenton, dum kiu vi staras en la koncertejo inter amaso da esperantistoj, kaj ĉiu kunkantas tiun kanton kies tekston ĉiu ŝajne konas, nur ne vi? Kaj kiam vi demandis iun, tiu nur rigardis vin grandokule kaj demandis „Kiiiiio? Vi ne konas tion? Ĉu vi vere estas Esperantisto“?

Nun ne plu! Unu post la alia, ni prezentos al vi famajn kaj belajn Esperantokantojn kun teksto kaj gitarnotoj, por ke vi ne nur povu kunkanti, sed eĉ daŭre ludi ilin kiam la koncerto estas jam longe finita. Ĝuu!

Sola

G Bm C D

Mi pagis kotizon al IJK,

G Bm C D

Sed nenio restis por la vojaĝ'

Mi pensis ke tio tute ne gravas,

Kaj iris al la voj' kun mia pakaĵ'

Mi levis la manon, ridetis al la ŝoforoj,

Sed neniun haltis kaj kunportis min.

Post ses horoj en pluvo kaj vento mi frostis tiel

Ĉiuj aŭtomobiloj preterpasis min tiel rapide

Kaj mi sentis min

Refreno:

G Bm C D

Sola, sola, sola

G Bm C7 D

Sentis min sola, sola, sola

Mi venis finfine al la kongreso

Kaj tie renkontiĝis kun karaj amikoj

Ni kisis, brakumis kaj estis gajaj,

Nun mi estas kun fratoj kaj fratinoj de la tuta mondo

Kaj ne

Refreno:

Sola, sola, sola

Sola, sola, sola

Ĉar ĉi tie mi pensas, estas bonega

Etoso, paco kaj amikeco

Kaj mi kredas ke neniun ĉi tie sin sentas

Malgaja, malbela, malamata

Kaj certe ne

Refreno:

Sola, sola sola

Certe ne sola, sola sola.

Poste ni ĉiuj vojaĝis hejmen

Al niaj landoj en la tuta mond'

Kaj nun mi pensas pri miaj geamikoj

Kaj sentas min iom malĝoja, malgaja

Kaj iom

Refreno:

Sola, sola, sola,

Iom sola, sola sola.

Imagu se ĉiuj homoj en la tuta mondo lernus Esperanton

Povus¹ esti ke tiam neniun iam iel ie

Sentus sin

Refreno:

Sola, sola, sola... (ktp.)

1) En la originalo „povu“, sed tio ne kongruas kun „sentus“ (voko)

•kune• estas la komuna membro-gazeto de la Germana kaj de la Aŭstria Esperanto-Junularo (GEJ kaj AEJ). Ekde 2011 ĝi aperas kiel interna revueto de *Esperanto aktuell*.

Korespond-adreso: Miriam Hufenbach, Carl-von-Ossietzky-Straße 55, 09126 Chemnitz, Germanio.

Retpoŝto: kune@esperanto.de

TTT: <http://www.esperanto.de/kune>

Estraro de GEJ:

Prezidanto: Carl Bauer

Pliaj estraranoj: Liesa Marie Alfier, Sophia Berlin,

Clemens Fries, Helen Geyer, Miriam Hufenbach,

Alexander Kozak, Alina Labitzke kaj Leo Sakaguchi

Adreso de GEJ:

Deutsche Esperanto-Jugend e.V.

Einbecker Straße 36, 10317 Berlin, Germanio.

Tel.: +49 30 42857899

Retpoŝto: dej@esperanto.de

TTT: <http://esperanto.de/dej>



Somera programo de la Esperanto-kastelo Greziljono

En Francio staras kastelo. Ne estas iu ajn kastelo. Estas – la Esperanto-kastelo Greziljono! Kaj ĉi-somere tie okazos kvar tem-semajnoj kun interesaj kursoj, seminarioj kaj aliaj aktivajoj – entute per Esperanto.

Jen la programo:

julio-21/28: **Art-amatora semajno** kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj en la Interreto: gresillon.org/s1

julio-28/aŭgusto-04: **Alternativa semajno** kun verd-politika seminario kaj Esperanto-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj. Informoj: gresillon.org/s2

aŭgusto-04/11: **Turisma kultura semajno**, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze. Informoj: gresillon.org/s3

aŭgusto-11/20: **Pupteatrafestivalo** por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj Esperanto-kursoj. Informoj: gresillon.org/s4

Por pliaj informoj: retpoŝto: kastelo@gresillon.org; ☎ +33-241 89 10 34; 🌐 www.gresillon.org; Adreso: Gresillon, 49150 SAINT MARTIN D'ARCE, France.

Julio 2012

10-15: 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava, Ĉeĥio, kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. 🌟 Eva.Kopečna@ivax-cz.com.

13-20: Somerferiaj Lingvokursoj por komencantoj ĝis parolantoj (A1-C1) en Herzberg/Harz, Germanio. Germana Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg/Harz - la Esperanto-urbo, Grubenhagenstr. 6, Germanio. ☎ +49-(0)5521-5983, 🌐 www.esperanto-urbo.de; esperanto-zentrum@web.de.

13-21: 10-a SOMERE en Jünkerath (inter

Kolonjo kaj Treviro), Germanio. Feriado en la naturo, promenoj, ekskursoj, prelegoj, kursoj, diskutoj, lingvokursoj - kaj agrablaj internacia etoso. EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiclefstr. 9, 2. Gartenhaus, DE-10551 Berlin, Germanio. 🌟 www.esperantoland.org/somere; lu.esperantoland@gmx.de

14-20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en la Esperanto-muzeo en Svitavy, Ĉeĥio. Tutsemajna aranĝo kies temo estos „Scienckficio kaj robotoj“. Rektmetoda kurso por komencantoj kun Stano Marček. Petro Chrdle, KAVA-PECH, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice, Ĉeĥio. ☎ +420736645455 🌟 www.kava-pech.cz/iek; chrdle@kava-pech.cz; onfo@kava-pech.cz.

14-21: 65-a Kongreso de IKUE en Pécs, Hungario, kun la temo „2012 Jaro de la Kredo: Mi kredas je unu dio“. Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, IKUE, Via di Porta Fabbrica 15, IT-00165 Roma RM, Italio. www.ikue.org/kong2012/index.htm; 🌟 kongreso@ikue.org aŭ ikuekongreso@gmail.com.

15-28: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. 2-a etapo. Vidu 01 julio.

16-20: Eŭropa Esperanto-Kongreso en Galivo, Irlando. 🌟 <http://eeu-kongreso.webnode.com>; europaesperantounio@gmail.com.

20-27: Somerferiaj Lingvokursoj por komencantoj ĝis parolantoj (A1-C1) kaj Somera Studmodulo por estontaj E-instruistoj kaj fakuloj, kaj pli en Herzberg, Germanio. Vidu 13 jul.

20-28: Muzika Staĝo kun Markov-familianoj en la kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoisier, FR-86410 Bourses, Francio. 🌟 www.kvinpetalo.org/spip.php?article37, info@kvinpetalo.org.

21-29: SEFT en Thomsdorf, Germanio. Ĝi ne havas fiksitan programon. Okazas nur tio, kion la partoprenantoj mem aranĝas. Ni helpas unu la alian kaj ferias komune. 🌟 www.esperanto-nb.de/seft/seft_eo.html; René Philipp tlustulimu@web.de.

21-29: Somera Esperanto-Studado – La 5-a renkontiĝo de lernantoj de lernu.net (sed ne nur de ili) en Nitra (90 km de Bratislava), Slovakio. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, vespere amuzado. 🌟 www.lernu.net/ses; petro@ikso.net.

26: Tuttaga aranĝo okaze de la reeldono de la „Unua Libro“ en Bjalistoko, Pollando. Bjalistoka Esperanto Societo, 🌟 esperanto.bialystok@interia.pl.

28 jul-04 aŭg: 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanojo, Vjetnamio. 🌟 www.uea.org; uea@co.uea.org.

28 jul-04 aŭg: 43-a IIK, Internacia Infana-junula Kongreseto en Hanojo, Vjetnamio. IIK-teamo, Schumann, 9 rue Couradin, FR-35510 Cesson-Sevigne, Francio. 🌟 <http://bertosch.free.fr/iik2012>; infana.kongreseto@gmail.com.

29 jul-05 aŭg: 62-a Kristana kongreso (KELI) en Zöblitz, Germanio. Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady, Ĉeĥio. ☎ +420 325615651. 🌟 polnický@quick.cz.

29 jul-10 aŭg: Somera Esperanto-Tendaro en Lančov, Ĉeĥio. 3-a etapo. Vidu 01 julio.

29 jul-10 aŭg: REF – Renkontiĝo de Esperanto-Familioj en Sayda, Germanio. Por familioj kiuj uzas Esperanton hejme kun siaj infanoj. Wolfram Diestel, 🌟 familioj.wikispaces.com/REF2012; ref2012@steloj.de.

Aŭgusto 2012

01-26: Ecotopia 2012 kaj Klimat- kaj Energietendaro en Lausitz, Germanio. 🌟 <http://ecotopia2010.org>.

05-12: 68-a Internacia Junulara Kongreso en Hanojo, Vjetnamio. Tuj post la UK, samurbe. 🌟 www.ijk2012.org; ijk68a.hanojo@gmail.com.

05-12: Esperanta FilmFestivalo kaj 45-a IEF en Szczawno Zdrój, Pollando, omaĝe al la 100-a datreveno de Zamenhof en Bad Salzbrunn. Ebleco spekti filmojn en belegaj montara kuraĉloko. Silezia Esperanto Asocio - Wrocław, ul. Świstackiego 9/21, PL-50-430 Wrocław, Pollando. 🌟 europonto.org/feriado/szczawno_f2012_eo.htm; pomer@wp.pl.

06-11: Praktikado de la lingvo (1-a kaj 2-a niveloj) kun Lala Ralalarisoa kaj Carlo Bourlot (el Madagaskaro kaj Italio) en la kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Vidu 20 jul.

16-25: SENPAGA instruista trejnado en Sicilio (Italio) 🌟 <http://edukado.net/novajhoj?id=205>.

16-28: Krozado tra Mediteranea Maro: Italio, Hispanio, Tunizio, Malto, Sicilio. Internacia Klubo „Esperantotur“, ul. M.Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando. 🌟 esperanto-turismo@wp.pl, andreo@rubikon.net.pl, info@esperanto.bydgoszcz.eu.

17-24: FESTO 2012 en Métabief, Francio. JEFO kaj Vinilkosmo organizos bonetosan someran renkontiĝon: muzikgrupoj, ekskursoj, festetoj kaj festegoj. Neforgesebla etoso en paradiza loko. JEFO, 2 rue du Téliège, FR-25370 Métabief, Francio. 🌟 festo.jefo.fr; info@esperanto-jeunes.org.

18-25: 79-a Kongreso de Esperanto en Italio en Mazaradelval, Sicilio, Italio. La temo: „Sed homoj kun homoj: la pluretna intuicio de Zamenhof“. Itala Esperanto-Federacio, via Villoresi 38, IT-20143 Milano, Italio. 🌟 www.kongreso.esperanto.it; kongreso@esperanto.it.

Novaj bildkartoj

Okaze de la 125jara jubileo de la Nurenberga Esperanto-grupo kaj la 90a Germana Esperanto-Kongreso en 2013, la grupo eldonis serion de 10 bildkartoj. Unu karto kostas 0,50 €, la tuta serio (plus la neaĉetebla flava karto pri la 90a GEK donace!) haveblas kontraŭ 4,00 € (+ afranko) ĉe Esperanto Nürnberg, Moritzbergstr. 37, 90482 Nürnberg, aŭ esperantonord@googlemail.com



90a Germana Esperanto-Kongreso 2013

De la 17a ĝis la 20a de majo 2013 okazos en Nurenbergo la 90a GEK. Kiel kongresejo funkcios la centre situanta Caritas-Pirckheimer-Haus. Lige al la kongreso la Nurenberga Grupo festos sian 125-jariĝon per antaŭkongresa aranĝo dum vendredo.